

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Subeniro kaj falo de  
UEA (Renato Corsetti)

Esperanto-novaĵoj

Gustumi buntecon en  
la ĉefurbo de Ĉuvaŝio

“Ne!” al lingvoj en  
danĝero

Lerni lingvojn interrete

Zbigniew Galor pri la  
“pola hejma milito”

Omo, la lingvo de homo

Retrovita teksto de  
Zamenhof

“Rusa antologio”:  
poemoj de Nikolaj  
Nekrasov

Novjorka intervjuo



2010

12

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №12 (194)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2011**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №12 (194).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 ноября 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Ĉu komenco de la fino?

Iutempe mi faris prognozon pri ebla rivaliĝo inter Dmitrij Medvedev kaj Vladimir Putin. Post ok jaroj de sia rego Putin devis havi laŭleĝan paŭzon, kaj tiu paŭzo personiĝis tiumomente en lia teamano Medvedev. Putin preferis lin el la duo antaŭelektita, kie alia kandidato — Sergej Ivanov — ŝajnis al la prezidento pli danĝera en perspektivo. La celo de la interprezidentecano estis simpla kaj maksimume klara — gardi la lokon kaj konservi ĝin ĝis la reveno de Putin.

Sed, kiel mi diris en la komento, la loko de prezidento subhavas certan rezervon, kiu kapablas ŝanĝi la situon. Tiu rezervo estas neniel mistera. Vole-nevole eĉ la plej obeema prezidento devas selekti teamon, vole-nevole li ĉirkaŭigas sin per rondo de konsilistoj, raportistoj, administristoj, servistoj kaj ĉambristoj. Kaj iom post iom tiu teamo akiras trajtojn de memstara eco kaj aĵo kaj ekhavas siajn proprajn interesojn. Kaj plej koncize tiu sumo de interesoj esprimiĝas en la formulo “Der Wille zur Macht”. Tia volo al povo neeviteble direktas la teamon puŝi la marioneton al memstara politiko. Tiel, iom post iom, obeema anstataŭanto ŝanĝas la psihologion kaj iĝas konkuranto.

Eble, “Der Wille zur Macht” estas iom tro forta esprimo, sed ni povas diri simple — la instinkto de memprotekto, kaj nenio ŝanĝiĝos en la esenco.

Nun ni povas vidi klaran realigon de tiu fatala dispozicio.

La unuaj signaloj de ankoraŭ kaŝita konflikto en la dueto Putin-Medvedev aperis antaŭ unu jaro, kiam politikaj simulantoj opoziciaj en la parlamento komencis subite en publiko esprimi malkontenton pri la konduto de la reganta partio en tiamaj lokaj reelektioj. Sekvis mitingo de “unuiginta opozicio” en Kaliningrado, kaj tuj — paŭzo, ĉar tiu neatendite ampleksa mitingo ŝajnis minaci la stabilecon politikan.

Kaj jen, ĉi-aŭtune, nova sismo de subtera streĉo: kaj surface oni observas la ostracismon de Jurij Luĵkov.

Luĵkov, membro de la teamo de Putin, estis la tria ĉefa figuro en la Nova Ruslando. Urbestro dekokjara de Moskvo, li opiniis sin neŝancelebla elemento en la putinista tektoniko de la povo. Lia falo evidentigis novan bilancon de fortoj.

La teamo de Putin ne rapidas kapitulaci. Sed oni devas konstati, ke ĝi perdis la iniciativon kaj kontentiĝas per propagandaj manipuloj televidaj kiuj celas recelas sugestis al la publiko la saman bildon de la potenca politikisto Putin: Putin en aviadilo, Putin en bolido de “Formulo 1”... la eterna ripeto sen aludo de antaŭa efekto.

Jam oni eĉ ridas.

Kaj rido... rido estas komenco de la fino politika.

**Alen Kris**

En aŭtuno (nord-hemisfera) komenciĝas studjaroj, kaj esperantistoj intensigas siajn informadon kaj varbadon. Interalie, en Lingvaj Festivaloj, en kiuj la esperantistaj organizantoj ne nur elstarigas sian lingvon, sed ankaŭ apogas multlingvecon kaj multkulturecon per lingvoprezentoj, lecionetoj, kaj koncertoj. Sur la kovropaĝo estas juda danco en la 15a Lingva Festivalo en Ĉeboksaro. (*Fotis Irina Jakovleva*)

# Subeniro kaj falo de UEA

de Renato Corsetti

## Subeniro

Estas tre malfacile por mi verki ĉi tiun artikolon, ĉar agnoski la subeniron de UEA dum mia aktiva vivo signifas agnoski mian propran malsukceson. Sufiĉas rigardi la grafikajon en [http://eo.Wikipedia.org/wiki/Membronombroj\\_de\\_UEA](http://eo.Wikipedia.org/wiki/Membronombroj_de_UEA).

Surbaze de la informoj en tiu artikolo kaj la statistiko aperinta en la aprila numero de la revuo *Esperanto*, jen la ciferoj de la kuniĝintaj individuaj kaj asociaj membroj de UEA en tri ekzemplaj jaroj:

1987 — 43.642

1999 — 19.170

2009 — 18.318

Se oni konsideras nur la individuajn membrojn oni ricevas similan bildon. Ili iras de 7.281 en 1987 al 5.713 en 2009. La ĝenerala tendenco estas nemiskompreneble subenira.

Jam multaj provis doni klarigojn, kaj ili ĉiuj estas parto de la vero: la eks-socialismaj landoj de orienta Eŭropo ne plu pagas por tre altaj membronombroj, la interreto ebligis altiĝon de la nombro de lernantoj de Esperanto, kaj ĝi samtempe proponis al ili manierojn facile komuniki kaj organiziĝi senpage.

Ĉu vi volas praktikan ekzemplon? En la retlisto “La Bona Lingvo” estas cento da homoj, kiuj vigle laboras kaj diskutas. Ili tamen rezistas formale aliĝi al asocio pri tiu temo, eĉ se la aliĝkoto estas nula.

Kompreneble kelkaj ne rezistas la tenton de simplaj klarigoj, kaj kulpigas pri la falo de la membraro Corsetti-n aŭ Osibov-on aŭ la redaktanton de la revuo aŭ la sekretarion de la loka klubo en Pfaffenheim. Sekvante tian logikon, mi kulpigus Waringhien-on, ĉar li enmetis tro da novaj radikoj en PIV.

Sed io ĝenas min ankoraŭ pli ol la falo de la membronombro, tio estas la falo de entuziasmo rilate al la celoj de la Esperanto-movado pli ĝenerale kaj de UEA tute aparte. Tiu manko de entuziasmo ne estas problemo nur de la Esperanto-movado. Tamen por ni ĝi estas pli danĝera. Ni estas movado kun granda celo: disvastigi neŭtralan duan lingvon, atingi lingvan justecon en la mondo, certigi la lingvajjn homajn rajtojn de ĉiuj. Se ni rezignas pri tio, ni povus

same utile, aŭ eĉ pli utile, amuziĝi per fiŝkaptado.


## Supreniro

Tamen tio, pri kio mi kaj la legantoj ĉefe interesiĝas, estas la situacio de Esperanto pli ol la situacio de UEA.

Se oni fidus la nuntempan biblion, tio estas Vikipedio, oni trovas ciferojn pri ĉiuj fenomenoj de Esperanto kaj Esperantujo en la lastaj jardekoj. Vidu, ekzemple, [http://eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko\\_de\\_Esperantujo](http://eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko_de_Esperantujo). Kompreneble oni uzu tiun fonton singarde, sed tiuj ciferoj kongruas kun la sperto de ĉiu reta uzanto.

En la lastaj jardekoj dum la membronombroj de UEA iris suben kune kun la entuziasmo pri la estonteco en industriaj landoj, Esperanto havis renaskiĝon en la reto kaj ekster Eŭropo.

Rilate al la reto mi nur montru ĉi tiun grafikajon, kiu montras la vizitantojn al la paĝoj de lernu.net inter novembro 2004 kaj aprilo 2009:



La tendenco estas evidente suprenira.

La samon oni trovas, se temas pri Afriko aŭ Azio.

## Falo

Kial ekestas ĉi tiu kontrasto inter subeniro kaj supreniro? Mi ne vere scias, sed mi provos konjekti kune kun vi.

UEA restis senŝanĝe la asocio, kiun Hodler fondis kaj Lapenna modernigis en aliaj historiaj momentoj. La mondo verŝajne volas ion alian. La junaj lernantoj en la reto ne volas pagi kaj ne volas aliĝi. Ili sentas lojalecon (kelkfoje veran kaj profundan) nur al sia komputila marko kaj al sia komputila mastruma sistemo.

La homoj ekster Eŭropo plejparte ne povas pagi membro-kotizojn, eĉ se ili

pretus. Ĉiuokaze ili ne sentas grandan identiĝon kun asocio bazita en Eŭropo kaj tro eŭropece funkcianta.

Certe je la nuna ritmo de perdo de membroj, UEA havos la forton por vivi kun ĉiam malpli da servoj kaj ĉiam pli margena en la vivo de Esperantujo, ankoraŭ 10 jarojn, eble 20.

Ĉu ankoraŭ estas tempo por savi UEA-n?

Tamen, laŭ mi, ankoraŭ estus ebleco ŝanĝi la sorton de UEA kaj mi nur bedaŭras ne esti 40-jara por provi kuntreni homojn fari tion. Mi nun povas nur konsili.

Unue, ni agnosku, ke ni eraris. Due ni kolektu ĉiujn kolekteblajn junajn fortojn ekzistantajn. Trie ni aŭskultu iliajn konsilojn. Tion devus fari la estraro de UEA, se ĝi kapablas. Tion devus helpi, ne rezisti, la ceteraj strukturoj de UEA.

Poste oni devus lanĉi kune kelkajn projektojn. Eble la ĉefa estus kreado de granda paĝaro, kiu fariĝus la Tutmonda Kunligejo kaj Oficejo, kaj transprenus la rolon de la nuna Centra Oficejo. En ĝin devus esti enmetitaj nepre reta kurso pri Esperanto en multaj lingvoj (praktike lernu.net evoluigita kaj financata ankaŭ de UEA), retejo pri instruado (sama afero rilate al edukado.net), ligoj al ĉiuj landaj asocioj kun kiuj oni devus kunlabori (eble parto de la paĝaro povus nomiĝi ni-estas-en-la-sama-boato-net). La Tutmonda Kunligejo kaj Oficejo devus esti preta registri esperantistojn ankaŭ sen kotizoj.

Samtempe oni devus lanĉi ankaŭ kelkajn mondajn projektojn pri kiuj esperantistoj povus voli doni monon aŭ almenaŭ laboron. Mi donas ekzemplojn:

- Lingvaj homaj rajtoj por ĉiuj,
- Esperanto en la aviadila trafiko,
- Esperanto en Ameriko,
- Instruado de Esperanto laŭleĝe en la lernejoj de ĉiuj landoj.

Temas evidente pri nuraj ekzemploj. La vera listo povas esti tute malsama.

Eble tiel oni farus provon por revenigi la malaperintan entuziasmon kaj ŝanĝi la etoson de homoj sur *Titanic*, kiuj kverelas inter si.

Se esperantistoj kaj neesperantistoj pretus doni monon kaj laboron por la administrado de idealismaj kaj entuziasmigaj projektoj, eble malaperus ankaŭ la granda koŝmaro pri falanta membronombro, kaj ĉiuj laborus kune por io inda.

Mi reemfazu: neniu individua homo kulpas pri la stato de UEA. Simple la mondo ŝanĝiĝis kaj UEA ne. Ni provu kune ŝanĝi ĝin.

## Kiel fartas TEJO?

29 okt – 1 nov dum la longa Halovina semajnfino en la Centra Oficejo en Roterdamo kunvenis la Estraro de TEJO.

Lanĉiĝis dum la kunveno la nova retejo de la revuo *Kontakto*: [kontakto.tejo.org](http://kontakto.tejo.org). Per ĝi eblas facile kontribui artikolojn, kaj sekvi la fluon de novaĵoj. Venontjare ekefikos la nova koncepto de *Kontakto* sub la redaktado de Rogener Pavinski el Brazilo, laŭ kiu *TEJO Tutmonde* iĝos rubriko “Kontakto-Movade” en *Kontakto*, kiun gvidos la nuna redaktisto de TT, Nicola Ruggiero el Italio/Islando, kiu ankaŭ redaktos la retejon.

Decidiĝis ankaŭ la planoj pri *Pasporta Servo* en 2011. Oni elprenos datumojn pri gastigantoj el la retejo kaj paperaj aliĝiloj state je 15 dec, kaj post prilaborado kaj enpaĝigo la libro laŭ la plano aperos en aprilo 2011. La nuna ĉefrespondeculo de *Pasporta Servo* estas Alexandre Baudry el Francio.

La LKK de la Ukrainia IJK en 2011 informis ke oni ŝanĝis lokon, tiel ke la kongreso okazos en Kievo mem, sed ne en antaŭurbo. La Estraro daŭre atendas kandidatiĝojn de landaj sekcioj por IJK en 2012.

Kiel kutime okazis sesio kun Osmo Buller kaj Loes Demmendaal. Marek Blahuš estis aprobata kiel komitatano A de TEJO ĉe UEA.

Okazis ankaŭ kunveno kie oni pridiskutis la temon de junuloj sub 18 kiuj ofte “perdiĝas” el la movado, ĉar ili ne havas lokon kien iri kaj IJK ne tute taŭga kaj havas alian celgrupon. La kunveno okazis kun Adélaïde Charrière kaj Tina Tišljar kiuj venis speciale por pridiskuti la temon. La estraro aprobis la ideon starigi komisionon pri “adoleskula agado”, kaj oni planas baldaŭ starigi komisionon sub la gvido de Adélaïde Charrière.

Krome okazis sesioj pri strategiaj planoj de KER; la retejo [tejo.org](http://tejo.org)...

Derk Ederveen, kiu dum 1995–2008 prizorgis la *Pasportan Servon*, iĝis honora membro de TEJO. Dum la kunveno de la Estraro de TEJO en Roterdamo okazis solena transdono de la certifikato en la Centra Oficejo.

“Pasporta Servo estas unu el la plej gravaj eroj de la Esperanto-kulturo. Por la tuta juna generacio, ĝia patro estas Derk Ederveen”, — emfazis Gregor Hinker, prezidanto de TEJO. La honorito aldonis: “Mi deziras al vi multe da sukceso kaj fidus ke vi bone vartos mian infanon, Pasporta Servo”.

Laŭ <http://tejo.org>



## UK-96: kontribuu al la programo

Dum la 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago okazos la 63a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi ĝis 31 jan 2011 proponojn al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel (PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo); [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il).

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego rajtas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj prelegoj lige kun la kongresa temo “Dialogo kaj interkompreno”. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto. La proponoj estos prijuĝataj de la IKU-komisiono, kaj sekve la Estraro de UEA decidos, kiuj estos akceptitaj.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo.

En la 96a UK en Kopenhago okazos ankaŭ la tradicia Esperantologia Konferenco. Ĝia organizanto estas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La Esperantologia Konferenco celas doni eblecon prezenti rezultojn de novaj esploroj kaj ebligi sperto-interŝanĝon kun aliaj esperantologoj. Same kiel la prelegoj de pluraj antaŭaj sesioj, ankaŭ tiuj en Kopenhago estos poste eldonitaj kiel aktoj.

Interesatoj por prelegi sendu mallongan biografian informon pri si kaj resumon de la proponata prelego al Detlev Blanke ([detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de)).

GK UEA

## Respondo de la Eŭropa Komisiono

La 24an de septembro 2010 la federacio *Eŭropo Demokratio Esperanto* (EDE) dissendis gazetaran komunikon pri sia starpunkto koncerne la novan lingvan reĝimon de patentoj en Eŭropo.

La 28an de oktobro la Eŭropa Komisiono respondis al EDE. La respondo ne estas surpriza, sed jam estas bone, ke ili respondis kaj bone notis la EDE-starpunkton. Laŭ la respondo, ŝajnas ke la komisionano Michel Barnier mem legis nian komunikon.

Legu la tradukon de la respondo, subskribita de Olivér Várhelyi.

*Estimata sinjoro,*

*La komisionano Barnier taskigis min danki al Vi pro Via retmesaĝo de la 24a de septembro, per kiu Vi bonvolis konigi al mi la starpunkton de Eŭropo Demokratio Esperanto pri la proponata konsilia regularo rilate al la tradukreĝimo de patentoj de EU. Ni notis Vian starpunkton kaj dezirus, per la jena letero, certigi vin, ke farante sian proponon la komisiono zorge pesis la porojn kaj kontraŭojn de la diversaj opcioj racie eblaj en la nunaj cirkonstancoj, aparte rilate al la patentjuro en Eŭropo. Vi trovos la konsiderojn, sur kiuj baziĝis la elekto farita de la komisiono, en la analiza raporto pri atendataj efikoj kiu akompanas la proponon de regularo kaj kiu alireblas ĉe tiu ĉi retadreso: [ec.europa.eu/internal\\_market/indprop/patent/index\\_fr.htm](http://ec.europa.eu/internal_market/indprop/patent/index_fr.htm)*

*Mi dankas Vin pro la intereso, kiun Vi montras por tiu ĉi dosiero, strategie grava por la novigemaj entreprenoj de Eŭropa Unio.*

Fabien Tschudy

## Esperanto sur la Silka Vojo

La Komisiono de UEA pri la Meza Oriento kaj Norda Afriko invitas al la 4a Mezorianta Kunveno, kiu okazos en Karaĝo (Irano) 25–29 mar 2011.

La temo de tiu ĉi pionira aranĝo de UEA en Irano estos *Esperanto sur la Silka Vojo*. Ĝi estigos eblecon renkonti samideanojn el diversaj landoj en la Meza Oriento, interkonatiĝi, diskuti gravajn kaj interesajn temojn kaj ankaŭ iomete turismumi en la gastiga lando.

Reta aliĝilo, informoj pri la kunveno kaj pri loĝado, kaj aliaj detaloj ĉe [www.arabujo.org/mk/2011/starto.php](http://www.arabujo.org/mk/2011/starto.php). Kaze de problemoj aŭ demandoj oni povas turni sin retroŝte al [kunveno@esperanto.org](mailto:kunveno@esperanto.org).

GK UEA

## Ĥorfestivalo kun ... Esperanto!

En la plenplena kulturcentro de Bredene (ĉe la belga marbordo) okazis 14 nov ĥorfestivalo sub la titolo “Ĥoroj en ĉiuj ŝtatoj”, partoprenis ĝin ses ĥoroj el tri flandraj urboj: Bredene, Oostende kaj Veurne.

En la programo estis kantoj el pluraj landoj, kaj do en diversaj lingvoj, ne nur el Eŭropo (Belgio, Britio, Francio, Hispanio, Italio, Nederlando, Finnlando, Ruslando...) sed ankaŭ el aliaj kontinentoj (Indonezio, Israelo, Jamajko, Kubo, Sud-Afriko, Usono...).

La apoteozo okazis je la fino de la festivalo, kiam la ses ĥoroj ekkantis kune la *Himnon al la ĝojo* en ... Esperanto. Entuziasme la ĉeestantoj forte aplaudis kaj bisis, kion afable faris la ĥoristoj, akompanataj de kelkaj spektantoj, kiuj trovis la tekston sur la lasta paĝo de la programo.

**Germain Pirlot**

## Zsófia Kóródy honorita

Zsófia Kóródy dum solena festo en la kavalira salono de la kastelo de Herzberg am Harz la 26an de oktobro ricevis publikan distingon pro sia pli ol sepjara honor-ofica agado por Esperanto kaj por la Esperanto-urbo Herzberg.

La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, emfazis ŝian multflankan kaj senlacan agadon en diversaj sferoj: klerigado, kulturo, instruado, organizado de internaciaj lernejoj projektoj, ĝemelurbaj kontaktoj, enkonduko de Esperanto-ekzamenoj laŭ KER, prizorgado de la granda Esperanto-biblioteko k.a.

En ĉeesto de multaj politikistoj kaj reprezentantoj de aliaj asocioj kaj kulturgrupoj Gerhard Walter transdonis al Zsófia Kóródy gratuldokumenton kaj ombrelon kun la bela surskribo “Herzberg ... la Esperanto-urbo”.

La urbestro substrekis la valoron de Esperanto por Herzberg kaj anoncis akceladon de la poresperantaj agadoj. Jen bonaj ekzemploj: baldaŭa fondo de la Fondajo “Esperanto-urbo Herzberg”, starigo de “kontinentaj Esperantodomoj”, ekzemple, “Azia Esperantodomo”.

Tio estas belaj kaj realigendaj paŝoj en ne tro fora futuro. Bonvolu serioze kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg!

**Petro Zilvar, Harald Mantz**

Gerhard Walter legas la laŭdortojn kaj listigas la volontulajn taskojn de Zsófia Kóródy.

## Bosnio: Ronda tablo por la jubileo

Por festi la 100an datrevenon de Esperanto en Bosnio kaj Hercegovino, la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) organizis en la ĉefurbo Sarajevo 29–31 okt 2010 simpozion “Eŭropa Unio — hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ: lingvaj kaj kulturaj aspektoj”. La Ronda Tablo, kiel la simpozio estas nomita, kunvenigis tridekon da fakuloj el 15 eŭropaj landoj.

La simpozian temaron enkondukis Michel Duc Goninaz, kiu evidentigis ke la koncepton de Eŭropo oni limigas al pure politika organizaĵo, la Eŭropa Unio, kion aludas ankaŭ la Ronda Tablo. En ĝi koncerne la lingvan situacion regas plurŝtupa malegaleco.

Oscar Puig pledis por unue difini la tri esencajn fenomenojn: lingvo, nacio, ŝtato, kaj konkludis ke neoficialaj lingvoj havas malmultajn ŝancojn pluvivi, precipe tiuj kiuj ne havas ŝtatan potencon por protekti ilin.

Maria Butan konstatis, ke Eŭropo konsistas el multaj regionoj kaj landoj kun specifaj trajtoj. Unu el ili estas Banato, kiun ŝi trovas kiel ekzemplon de bone funkcia plurlingveco kaj multkultureco.

La kutiman aserton, ke lingvo estas iama dialekto je kies ŝultroj staris armeo, esploris Fabrizio Pennacchietti; kaj pri ĝi li konsentis sed donis kelkajn kazojn, kiam la skriba lingvo oficialiĝis en diverslingva regno ne pro superpotenco de la regantoj, sed danke al ĝia kultura prestiĝo aŭ pro ĝia komunika efikeco.

Zlatko Tišljar esploris eŭropan identecon kaj lingvojn, kaj konkludis ke nova eŭropa identeco necesigas la ekziston de nova identeca lingvo, nepre neŭtrala. Sed laŭ Đorđe Dragojlović la eŭropa



István Ertl prelegas nome de IKEL

identeco estas longdaŭra proceso eble neniam atingebla, kiu manifestiĝas en interpenetrado de kulturoj funkcia eĉ kontraŭ nia volo.

István Ertl emfazis, ke rajtoj de minoritatoj estas unu el la pilieraj pensoj de Eŭropa Unio, sed ke en eŭropa juro malmultas rimedoj efektive protektantaj lingvajn minoritatojn.

Nikola Rašić prilumis situacion de “eŭropaj” romaoj, kies lingvo estas la plej eŭropa el ĉiuj, sed kun amaso da problemoj ene de ĝi kaj en la socio ĝin portanta. Eduard Kusters, eksponinte la belgan situacion, konstatis ke solvoj ekzistas kaj en socia-ekonomia vivo kaj en lingva problemaro, sed kontraŭ altega prezo. Kion albanoj, estontaj civitanoj de EU, krom plia oficiala lingvo, alportos al ĝi, raportis Bardhyl Selimi.

Barbara Pietrzak opiniis, ke la eŭropa devizo “unuigintaj en diverseco” bezonas adekvatan lingvan instrumenton, el kiuj Esperanto ŝajnas la plej adekvata, por ĝin vivigi. Kiel tion atingi spertis Laszlo Gados kunagante en la kampanjo “Komunikado en Eŭropa Komunumo”. Bojidar Leonov, parolante pri patent- kaj scienc-teknika informado, emfazis ke lingva problemoj tiukampe daŭre baras efikan kunlaboradon de fakuloj kaj institucioj.

La prezentitaj prelegoj levis frukton: debato kaj opiniinterŝanĝojn, kiuj aperos en eldonota libro pri la Ronda Tablo.

La simpozio fakte estis la centra manifestacio per kiu la Esperanto-movado en Bosnio-Hercegovino celebris sian centjariĝon. Dum solena kunveno de la asocio oni disdonis dankdiplomojn al la plej meritplenaj agantoj kaj institucioj. La referaĵon okaze de la centjara jubileo prezentis Senad Čolić.

La simpozio enhavis ankaŭ altnivelan kulturalan programon, promenadon tra Sarajevo, la “Eŭropa Jerusalemo”, kaj eĉ inaŭguron de nove aĉetita sidejo de ELBiH en la centro de la urbo.

**Selma Zvirac**

## Varsovio: Tago de Diverseco

La 17an de oktobro en la grandega Varsovia komerca centro *Oraj Terasoj* okazis Tago de Diverseco — unu el kvar eventoj disvolviĝintaj sur la tereno de la Eŭropa Unio sub la slogano “Por diverseco, kontraŭ diskriminacio”. Krom Varsovio la Tago ĉi-jare okazis ankaŭ en Budapeŝto, Metz kaj Ateno.

Al la partopreno en la Tago, inter kelkdek asocioj, estis invitita ankaŭ Pola Esperanto-Asocio.

Unu el niaj celoj estis prezenti la diversecon de esperantistoj kaj ilian agadon, kiu superas diversajn formojn de diskriminacio. Dum la tago eblis diskuti kun personoj, kiuj uzas Esperanton en la ĉiutaga vivo kaj havas multon direndan pri problemoj de diskriminacio. Inter ni estis, ekzemple, handikapita usonano, pola-japana geedza paro kaj membrino de la Varsovia Esperanto-klubo, ĉi-jare festinta la 90-an naskiĝdatrevenon.

Krome, la Varsovia Filio de PEA kun ĝia prezidanto Mariusz Majewski aranĝis diskuton pri la historio kaj evoluo de Esperanto kaj esperantistaro. Aktoroj el la Varsovia kabaredo *La Oraj Pantalonoj en Arbustoj* rakontis pri okazintaj prezentiĝoj kaj pri siaj planoj. Ili varbis al lernado de Esperanto kaj ankaŭ al elprovo de aktora talento sur la esperantista scenejo sub la gvido de sperta reĝisoro. Por montri Esperanton okazis mallongaj lecionoj, kiuj logis grandkvante la vizitantojn. Multaj esprimis la deziron daŭrigi la lernadon de Esperanto en kurso komence de novembro.

Por la plej junaj vizitantoj estis organizitaj lingvoludoj. La infanoj facile kaj rapide kaptis la esencon de la ludoj kaj kun ĝojo povis reveni al siaj gepatroj kun malgrandaj memoraĵoj. Por multnombra publiko, vizitanta la komercan centron, Marian Zdankowski preparis kaj gvidis kvizon pri Esperanto. Pluraj partoprenantoj de la kvizo ricevis memordonacetojn.

La Tago de Diverseco venigis al Varsovio esperantistojn el diversaj lokoj de Pollando inkluzive de la prezidantino de PEA, Halina Komar. Ĝi estis la dua (post la junia Scienca Pikniko) okazo por Varsoviaj esperantistoj prezentiĝi al vasta publiko kaj informi pri Esperanto.

Preparis kaj partoprenis, inter aliaj: Halina Komar, Mariusz Majewski, Marian Zdankowski, Alina kaj Agnieszka Mozer, Agnieszka kaj Arkadiusz Zychewicz.

**Anna Magier,  
Arkadiusz Zychewicz**

## Retparlamento: 20% por Esperanto

Laŭ propono de la esperantista partio UNU MONDO, la germana interreta parlamento ĉe Facebook invitis siajn 288 anojn voĉdoni pri Esperanto.

Por ne falsi la rezulton, la proponintoj nek diskonigis la voĉdonon anticipe inter esperantistoj nek mem partoprenis en ĝi. Entute 69 parlamentanoj eluzis sian voĉdonrajton. El ili, 14 (t.e. 20,3 %) subtenis la proponon, dum 33 (47,8 %) kontraŭis ĝin. La ceteraj 22 (31,9 %) sin detenis. Relative alta — kompare kun aliaj voĉdonoj de tiu retparlamento — estis la nombro de la indiferentaj parlamentanoj, kiuj ne partoprenis en tiu voĉdono, nome 219 el la 288 parlamentanoj.

La interreta parlamento estas privata iniciato ĉe Facebook. Ĉar ĉiu membro voĉdonas publike, la rezultoj estas bone kontroleblaj. Jen la preciza teksto de la propono, kiu publikigis 10 nov 2010 sub la titolo “Esperanto fördern” (Subteni Esperanton):

“Kiel neŭtrala, facile lernebla dua lingvo Esperanto povas esence faciligi internacian kompreniĝon. Farante tion, ĝi ne forigu la naciajn lingvojn. Esperanto konstruas pontojn inter lingvoj kaj kulturoj kaj akcelas egalrajtan kunlaboron trans limojn. Ĝi faciligas al homoj senti sin mondĉivitanoj. Krome ĝi estigas tre bonan bazon por lerni pliajn lingvojn. Sekve estas dezirinde, ke Esperanto estu — almenaŭ sen devigo — pli multe instruata en lernejoj”.

La rezulto unuavide ne aspektas tre favora, sed supozeble bone spegulas la ĝeneralan sintenon de germanoj pri Esperanto. Notindas, ke el ĉiuj 288 parlamentanoj, nur 4,9% estis por kaj 11,5% kontraŭ la propono. Pro la alta nombro de indiferentuloj, Esperanto tamen povas foje — se iuj klare favoras ĝin — havi iujn sukcesojn en voĉdonoj, kiel montriĝis jam en la konsilioj de la germanaj urboj Aalen kaj Herzberg.

**Ulrich Matthias**

Dum la Tago de Diverseco Varsoviaj esperantistoj respondis multajn demandojn.



## Verda Karnavalo

Same kiel okazas ĉiujare en oktobro, Esperanto Grupo *Lazaro Luiz Zamenhof* realigis la 23an de oktobro sian balon.

La karnavalo celas revivigi kutimojn kaj tradiciojn, forgesitajn de la maljunuloj kaj nekonatajn de la gejunuloj. Dum la balo oni disdonis faldfoliojn pri Esperanto kaj ankaŭ prezentis en Esperanto karnavalajn muzikojn de Sylla Chaves. Ni konsideras la balon nia ago-tago.

Kuraĝigitaj de la karnavala muzikistaro, ĉiuj dancis dum la tuta balo laŭ oldaj karnavalaj muzikoj. La balo okazis de la 6a vespere ĝis la noktomezo. Je la 9a vespere oni faris paŭzon, kiam esperanta paro prezentis du dancojn, la unuan laŭ la olda karnavalo kaj la duan laŭ la aktuala karnavalo kiel gestandardistoj. Dum la paŭzo okazis konkurso pri originala fantazia vesto. Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj surmetis fantaziajn vestojn kaj maskojn. Ĝenerala ĝojo, multe da dancoj kaj la bufedo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kontentigis ĉiujn.

**Paulo Kverko**

## En Ĉuugoku-Ŝikoku

La unuan novembran semajnfino okazis la 11a Kongreso de Ĉuugoku-Ŝikoku Esperanto-Ligo en la urbo Higaŝi-kagaŭa (Ŝikoku) kun 40 kongresanoj. 15 el ili partoprenis la antaŭkongreson, kaj vespere ĝuis luksan bankedon, gajan aŭkcion sub sperta prezido de Tahira Masako el Kioto, kaj proksimume 26 mil enoj iros al Haitia helpo.

Kongresanoj interparolis per skajpo kun samideanoj de Koreio, Ĉinio kaj Ruslando sur grandaj ekranoj; tion organizis Kitani Tomoko. Japanaj esperantistoj havos samon en postaj eventoj.

Ĝojinde la du invititaj junuloj — Okabe Akiumi kaj Nitta Takemiĉi — ĝuis la kongreson. Ĉar kongreso tro multe kostas por junuloj, oni konsideru la eblecon ankaŭ en venontaj eventoj organizi senpagan partoprenon de junuloj.

La kongresa programo enhavis ankaŭ elementan kurson de Osioka Taeko, kiun ĝuis komencantoj; unu el ili, profesoro pri mastrumado, decidis aliĝi al la Esperanto-kurso en Hiroŝima.

La standardo de la Ligo transiris al Okajama, kies reprezentanto Harada Hideki, la nova prezidanto de la Ligo deklaris, ke la 12a Kongreso okazos en novembro 2011 en Kibiji, okcidente de la urbo Okajama.

**Oshioka Moritaka**

## Ĉeboksaro: gustumi la buntecon

14–24 okt en Ĉeboksaro, la ĉefurbo de Ĉuvaŝio (Ruslando) pasis la 15a Internacia Lingva Festivalo.

Ĝin organizis Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kun subteno de Ministerio pri edukado kaj helpo de pluraj organizoj: volontula centro *Sodruĵestvo*, Fremdlingva lernejo *Jazik dlja uspeha*, nekomerca organizo *Edelveys*, ĉuvaŝkultura movado *Haval* k a.

La Lingvajn Festivalojn organizas esperantistoj por neesperantista publiko. Ili helpas diskonigi celojn kaj agadon de esperantistoj kaj disvastigi la aprezon al la lingva diverseco, toleremo, justeco kaj paco.

La Festivalo daŭris dek tagojn laŭ la kutima skemo: je la komenco gazetara konferenco. Dum la unua semajno pasis karavanoj — lernejoj festivaletoj dum kiuj kutime prezentiĝas kvin lingvoj. Niaj lingvoprezentantoj vizitis 13 lernejojn en la ĉefurbo kaj en provinco de Ĉuvaŝio: ne malpli ol 1500 paroj da okuloj gustumis buntecon de multkulturiĝo kaj multlingveco. Kaj la lastan semajnfino Ĉuvaŝa Ŝtata Pedagogia Universitato akceptis la Lingvan Festivalon mem, kiu malkovris novajn sciojn pri lingvoj, kulturoj, landoj kaj homoj.

Entute estis prezentitaj 46 lingvoj, dialektoj kaj kodlingvoj. Aparte menciindas lingvoj kiuj ankoraŭ ne aperis inter la muroj de la festivalejo: nord-okcidenta dialekto de la maria lingvo, aragona, ĉokve, pikarda, tuvaa.

Al la Festivalo venis volontuloj el Germanio, Finnlando, Turkio, Ĉeĥio kaj Hispanio, invitatitaj de la volontula centro *Sodruĵestvo*. Ili ne nur gastis en Ĉeboksaro, sed ankaŭ partoprenis la tutan programon de la festivalo inkluzive de la gazetara konferenco, karavanaro kaj la Festivalo mem.

Krom volontuloj eksterlandaj, venis gastoj el Moskvo, Kazano, Uljanovsko, Ufo... Kiel ĉiam, abundis studentoj de la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato. Rimarkigis ankaŭ junaj gepatroj kun infanoj — tiuj gepatroj iam partoprenis la organizadon de antaŭaj Festivaloj.

Dum la Festivalo ni daŭrigis la tradicion de vasta uzado de la ĉuvaŝa lingvo. Per tio ni emfazas la gravecon kaj utilecon de la lokaj lingvoj, inverse al kutimo konsideri la ĉuvaŝan lingvo por paroli inter kamparanoj.

Sekvajare tuj post la 16a Lingva Festivalo en Ĉeboksaro okazos la tutlanda esperantista kongreso.

**Danil Kapitonov**



Ĉuvaŝa danco en Ĉeboksaro (Fotis Irina Jakovleva)

## Spionetosa semajnfino en Arrout

Komence de la renkontiĝo, okazinta 9–10 okt en Arrout (Francio), niaj aŭtoroj, Marion kaj Christophe, disdonis paperetojn al ĉiuj, eĉ al la komencantoj. Ni devis sekrete legi misteran frazon el du partoj, kaj poste kaŝi la paperon, aŭ gluti ĝin...

Dum du tagoj ni devis atente provi diri la unuan parton de nia frazo, kaj kiom plej atente aŭskulti ĉu iu diros la duan parton... Se jes, vi gajnis la unuan parton de la ludo, trovinte vian paron. Sed vi povas plibonigi la aferon, se vi sukcesas malkovri la aliajn parojn... Mi ne klarigos al vi la strangajn babiladojn, kiuj okazis inter la homoj...

La programo ebligis la partoprenantojn ĝui promenadon ĝis apuda vilaĝeto, kie eblis admiri malnovan preĝejon, malnovan hidraŭlikan draŝmaŝinon, interparoli kun vilaĝanoj kaj profiti la belan veteron de la indiana somero.

Vespere ĉiuj ĝojis transloĝiĝi al tiu ĉi virtuala vilaĝeto, kie homlupoj kutimas mortigi vilaĝanojn, kie geamantoj projektas unu la alian, klarvidulino decidas ĉu orienti aŭ ne la enketon. Kaj ĉiu akuzato ĵuras ke li senkulpas, krias, defendas sin, kaj fojfoje tiel bone mensogas ke li sukcesas trompi ĉiujn: fripono!

Sed, hororo, kiam, tuj post la dimanĉa matenmanĝo, oni malkovris kadavron en la ĝardeno... Kiu, kiam, kial, kiel? Kaj denove, sen forgesi nian sekretan frazon, duope, triope, la gajaj ĉeestantoj provis liveri alibiojn, pruvante ke ili estas kunkulpaj!

Fine de la renkontiĝo, ĉiuj enigmoj solviĝis, kaj la esperantistoj disiĝis aŭfale, kun malpeza koro...

**Evelyne Rotellini**

Eventoj

## Meksiko: Ĉe lingvo-kongreso

12–13 nov 2010 Meksika Esperanto-Federacio (MEF) partoprenis en la 4a internacia kongreso pri lingvoj en la Universitato Aŭtonoma de San Luis Potosí.

La federacion reprezentis la prezidantino de MEF Mallely Martínez Mateos, la kasistino Morayma Martínez Mateos, estrarano David López Rueda, kaj membro Martin Schäffer. Sur la informstano estis riĉa elekto de literaturo, ekzemple: *Sanga Nupto* de Federico García Lorca, *Sonetoj* de Shakespeare, *Lingvo kaj Menso* de Noam Chomsky, *Tra l' okuloj del venkitoj* de Miguel León Portilla, *Ĉirkaŭ la mondo en 80 tagoj* de Jules Verne kaj *La infana raso* de William Auld. Altkvalitaj informfolioj en la angla kaj hispana informis pri diversaj aspektoj de la lingvo.

David López Rueda prelegis publike pri la temo “Esperanto — komunikado kaj interkultureco”. Dum la du tagoj multaj homoj vizitis la standon kaj povis informiĝi pri Esperanto. La intereso de la partoprenantoj, plejparte instruistoj pri la angla, estis granda.

**Martin Schäffer**

(Fotis Martin Schäffer)





## La 15a kongreso en Andaluzio

La lastan oktobran semajnfino la andaluzia esperantistaro havis sian 15an jarkongreson en Ĥaeno/Jaen kun kvardeko da kongresanoj.

En la malfermo Angel Arquillos, prezidanto de AEU, kaj Jordi Lieter, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, revokis en nia memoro la nomon de Alfonso Escamilla Roa, forpasinta veterana esperantisto, muzikisto, pentristo kaj instruisto.

La kleriga programo estis ampleksa. Wolfgang Günther prelegis pri “Kiosko de Levanto, transdisciplina almanako kun Esperanto kiel komuna lingvo”, kaj prezentis la kvaran numeron de tiu kultura revuo, aperanta unufoje en la jaro. José Rodríguez prezentis la temon “La mistera Jaeno: La Sankta Vizaĝo kaj la Belmezaj Vizaĝoj” kun fotoj pri la mistere aperinta vizaĝo sur la planko en domo de Belmez, vilaĝeto en la Jaena provinco. Jordi Lieter prelegis, helpe de projekciitaj bildoj, pri la olivoleo-produktado. Maciej Jaskot, profesoro pri la pola lingvo en la Granada Universitato, donis al ni bonan lecionon en sia prelego “Kiu bone prononcas Esperanton aŭ nefacila prononco de facila lingvo”.

Membroj de la Esperanto-Klubo *Aksarkio* plenumis la programon *Amuzaj Rakontetoj*, kiu estis speciale amuza kiam ili grupe rakontis pri *La nekredibla kaj vera historio de Verda Ĉapeto*. Angel Arquillos deklamis en Esperanto kaj hispane kelkajn poemojn.

Ĉiuvespere la kongresejo translokiĝis al la urbo, kies historian centron ni piede trairis spite de pluvo kaj vento.

**Julio Herrero**

## Ĝuinda Semajno en Katalunio

Al la 18a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, okazinta 2–9 okt 2019 en Coma-Ruga (Katalunio, Hispanio), aliĝis 133 gesamideanoj (ĉeestis 130) el diversaj landoj de Eŭropo kaj eĉ de Koreio. Feliĉe, la bona vetero nin akompanis kaj ĉiuj ĝuis la plezuron troviĝi apud la Mediteranea maro.

La inaŭguron prezidis magistratano Raul Buira, vicurbestro de El Vendrell (municipo al kiu apartenas Coma-Ruga). Ni havis la okazon lin danki pro la helpo, kiun ni ĉiam ricevis de la magistrato.

La programo enhavis interesajn prelegojn. Renato Corsetti prelegis pri la temo “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas paroli ĝin eŭrope”. Anna Löwenstein translokiĝis nin al tempo de la Roma Imperio. Gian Carlo Fighiera alportis al ni la esencon de la japana kino per la filmo *Rashmon* kaj ankaŭ parolis pri kelkaj noveloj de Boccaccio.

Antoni Marco Botella prelegante pri la centjara datreveno de la poeto Miguel Hernández, mortinta en karceri, rememorigis al ni la malfeliĉojn de la hispana intercivitana milito. Michéle Viliers kaj Hubert de Meyere montris al ni la historion, monumentojn kaj sciencarojn de la nuna kaj antikva Belgio.

Nia korea samideano An Jong instruis nin pri la agado de la Esperanto-movado por la paco, al kiu aliĝas homoj, kiuj ne estas esperantistoj. Lia ĉarma edzino Ko Kyun Ja, surmetinte elegantan tipan vestaĵon de la tradicia folkloro korea, entuziasmigis nin per koreaj dancoj kaj kantoj.

Wolfgang Gunther prezentis sian 400-paĝan almanakon *Kiosko de Levante*, kiu konsistas el artikoloj verkitaj de diversaj aŭtoroj, kaj insistis, ke UEA akceptu la ekologion, kiel unu el siaj taskoj.

La Premio Ada Fighiera-Sikorska estis aljuĝita al Rafaela Urueña, eksa prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj de la Esperanta Jura Asocio. La Esperanto-kurson gvidis Stano Marček. Funkciis libro-servo.

La plej grava ekskurso estis al Vendrell, kie ni malkovris strat-tabulon sur la fasado de la urbodomo en ĉeesto de la urbestro Benet Jane i Palau. Ni vizitis la muzeon de Pau Casals, unu el la plej famaj violonĉelistoj de la mondo. Ni ekskursis al monaĥejo de Montserrat, religia institucio plena da historio, kaj konsiderata kiel identigo de la kataluna popolo.

Menciinda estas la punkto de la folkloro, en kiu muzika emsemblo ludis, interalie, kuban muzikon. La folkloro estas akompanata de la fama *cremat* — rumo bruligita kun spicaĵoj. Ni okazigis du interkonajn vesperojn, en kiuj ne mankis ĉampano *Esperanto* kaj aliaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj.

En la diskut-programero dediĉita al Esperanto troviĝis la demando “Kio pri la Esperanta gramatiko, ĉu vi realigus modifojn?” Varma debato. Iuj konsideris, ke ne estas bezonata studi la gramatikon por posedi Esperanton. La artikolo “la” ricevis gravajn batojn, ĉar iuj opiniis, ke ĝi ne estas ĝuste aplikata. Fine oni venis al konkludo, pri la nepra bezono respekti la *Fundamenton*, ĉar alimaniere Esperanto displektiĝos.

**Luis Serrano Pérez**

## Radom: Antaŭ miloj da spektantoj

Jam la trian fojon okazis en la urbo Radom (Pollando) granda aŭtuna aranĝo *La strateto de tradicio*, preparita de la kulturdomo “Resursa Obywatelska” (Civitana Klubejo).

Dum du tagoj la loka Esperanto-klubo aktive ĉeestis. Interalie, nia kluba kanta dueto prezentis dum speciala koncerto la kanton *Sankta Antonio* en Esperanto. Kelkaj miloj da Radomaj spektantoj aplaudis la prezenton de nia kluba dueto kaj samtempe ili havis raran okazon unufoje aŭdi Esperantan version de ĉi tiu fama kanto.

**Antoni Dorosz**

## Vraco: En la urba biblioteko

Okaze de la Internacia Semajno de la Esperanto-Biblioteko, la 20an de oktobro 2010 membroj de la Esperanto-societo *Sukceso* en Vraco (Bulgario) renkontiĝis kun la sekretario de la urba kulturdomo Dimitar Tošev kaj bibliotekistinoj laborantaj en la biblioteko ĉe la kulturdomo.

Estis donacitaj raraj libroj kaj revuoj en Lingvo Internacia, eldonitaj en la komenco de la pasinta jarcento, kio pliriĉigos la Esperanto-fakon de la biblioteko. Tie estas deponita ankaŭ la riĉa libraro de la forpasinta esperantisto kaj astronomo d-ro Kiril Velkov.

Alia temo dum la renkontiĝo estis la eldono de la libro pri Radoslav Tričkov, siatempe esperanta konsulo (loka delegito), mondvojaĝanto, kursgvidanto kaj preleganto, kiu dum kelkaj jaroj estis ankaŭ prezidanto de la urba kulturdomo.

**HeKo**



## Tri motivoj de la Rata Rendevuo

Kiam Esperantistoj renkontas unu la aliajn, jenaj tri motivoj ludas gravan rolon: oni parolas Esperanton; oni revidas amikojn kaj trovas novajn; oni konatiĝas kun novaj lokoj kaj novaj ideoj. Ĉi tiuj tri motivoj estas bazo de la “Rata Rendevuo”, kiun la Esperanto-grupo Hameln *La Ratkaptista Bando* okazigas ĉiujare en malsamaj lokoj de la regiono.

Ĉi-jare Heinz Sprick, la prezidanto de la grupo, por la sepa fojo organizis la renkontiĝon la 6an de novembro en Lügde. Heinz Sprick montris per klaraj kaj praktikaj ekzemploj, ke la komputilo kaj interreto estas valoraj helpiloj por la Esperanto-lernado: multnombraj ret-paĝoj kaj videokonferenco per interret-telefono kun Esperanto-parolanto en transoceana lando tion pruvis. Ĉiuj partoprenantoj rimarkis, ke la tekniko kune kun Esperanto estas bonega ilo por la interkompreniĝo.

“Juna Esperantisto” estas Klaus Santozki, ĉar li komencis lerni Esperanton nur antaŭ naŭ monatoj. La 64-jara komencinto rakontis en memverkita Esperanto-anedkoto pri amuza travivaĵo dum la kurso, en kiu la tri partoprenantoj kun la sama nomo “Klaus” ludas gravan rolon. Alvaro Cortes alforĉis ferian etoson, ĉar li raportis pri vojaĝo al Svislando helpe de la *Pasporta Servo*. Zsófia Kóródy de la Interkultura Centro en Herzberg prezentis per multaj ekzemploj la diligentan laboron de la grupo en la Esperanto-urbo Herzberg.

Post la tagmanĝo sekvis la program-punkto “urbovizito”. La malnova urbomuro, la malnova urbocentro kun multaj trabfakaj domoj kaj la nova strattunelo estas ekzemploj, ke valoras vojaĝo al Lügde. Tre konata estas la urbo, ĉar ĉi tie okazas ĉiujare la Paska radrulado. Ses grandegaj radoj el kverka ligno, plenŝtopita de sekala pajlo, estas bruligataj kaj ruliĝas de la pinto de la Pasko-monto en la valon. Pli ol 20 mil homoj ĉiujare rigardas la spektaklon. La ĉiĉerono Dieter Stumpe klarigis tiun ĉi malnovan kutimon per vortoj, bildoj, filmo kaj praktikaj ekzemploj en la “Dechen”-muzeo.

Dum komuna kafotrinkado en malnova trabfakdoma kafejo multaj partoprenantoj decidis, ke ili ankoraŭfoje venos al Lügde (eble dum Pasko). Tio montras al la *Ratkaptista Bando*, ke oni elektis la konvenan lokon por la Rendevuo.

**Klaus Santozki**

## Tradukado en la Ĉeĥa Paradizo

La tasko de la 31a aŭtuna seminario, okazinta 11–17 okt en Skokovy (Ĉeĥa paradizo) estis tradukado de materialo por turisma informado helpe de sinjorino Eva Pánková kaj priskribado de promenoj en la plej proksima distanco.

Ne nur tion la seminario alportis. Ĉiuj, eĉ viroj, ornamis mielkuketojn kaj kreis el bidoj verdajn stelojn. Ĉar ĉeestis du francoj el Normandio, amikaj kaj afablaj, ĉiuj penis paroli nur en nia kara lingvo. La vesperaj prelegoj havis diversajn temojn, de Japanio ĝis hipnoto. Aperis nova informo pri “Avulino de Skokovy”. Prezentitaj estis libroj de Max Kašparů kaj la sesa *Legolibreto* de Drahotová. Geedzoj Dvořák projekciis profesionan filmon pri Vysočina por niaj gastoj.

Ĉiuj partoprenantoj laboris konkorde, kaj gastoj, venintaj nur por kelkaj horoj, povas tion konfirmi.

**Jindřiška Drahotová**

## Esperanto kun anglaj subtitoloj

SBS (Special Broadcasting Services) estas tutaŭstralia televida kanalo, kiu ĉi-jare festas sian tridekjariĝon. Okaze de sia naskiĝtago ĝi mallonge intervjuis diversajn homojn, kiuj pramaniere bondeziris al la festanto.

Parolante Esperante, salutis SBS-on la Adelajda esperantisto Sandor Horvath. Kun Esperanta T-ĉemizo en la filmeto li prezentas sin en la angla kaj angle diras, ke li estas esperantisto. Ĉio, kion li diras poste, estas jam en Esperanto — kun anglaj subtekstoj! Sandor gratulas al la festanta SBS kaj diras, ke estus bone vidi en ĝia programo ankaŭ Esperantan filmon.

Temas pri 20 sekundoj. Malmulte, sed ege multe! Ja ĝi aperadas de 24 okt kaj videblos en la televido ĝis la fino de decembro en plej diversaj tempoj en la interprogramaj spacoj de SBS, atingante milionojn da spektantoj. Por la aŭstraliaj esperantistoj, kiuj nun fervore preparas sian jubilean kongreson tiuj ĉi sekundoj donas bonan propagandon.

**Katja Steele**



but it would be great if you showed an Esperanto film on SBS one day.

## Unufraze

★ Itala E-Federacio ricevis de la Eŭropa programo Grundtvig subvencio de ĉ. 35 mil eŭroj por aranĝi seminarion pri Eŭropa identeco dum la venontjara Itala E-Kongreso. (Landa Agado)

★ Meg Bianchi k Giorgio Silber, kiel delegitoj de la Kultura Centro E-ista (Svislando) reprezentis Eon novembre en Prago en la 39a internacia konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo. (HeKo)

★ Varsoviaj e-istoj ricevis en novembro diplomon pro sia partopreno en la “Scienca Pikniko” organizita de la Pola Radio k la Scienca Centro Kopernik; la diplomo estis aljuĝita pro la “deziro ŝanĝi la mondon, senĉesa serĉado de novaj solvoj kaj entuziasmo en la perado de konoj”. (Landa Agado)

★ La firmao *Triballat* prezentis en la ekspozicio (Parizo, 17-21 okt) pakajojn de la jogurtoj *Sojasun* tute en Eo; esperantigis ĝin la kompanio *LinguaForce* en Rennes. (Ret-Info)

★ Studentoj de la Usona universitato Kolumbio pretigis 15-minutan filmon pri planlingvoj k amo *Conlang: the movie* (Planlingvo: la filmo), kiu jam furoris en kelkaj filmaj festivaloj; oni planas montri ĝin en la Malferma Tago en Roterdamo. (Alexander Osintsev)

★ Kun aprobo de la Ministerio pri Edukado estis fondita la lernejo Zamenhof en Rutshuru, D.R Kongo; ĝi havas 2 klasojn kun 58 lernantoj. (Useni Radjabu)

★ 12 nov la Ŝanhaja E-Asocio okazigis en la Ŝanhaja Politeknika Universitato la fakan konsultadon “Lerno kaj studo de Esperanto” kadre de la 9-a Sociscienca Semajno de Ŝanhajo. (ĈIIC)

★ La Zaozhuang-a Profesia Instituto decidis fondi du E-organizaĵojn: studentan E-Societon k filion de la Zaozhuang-a E-Asocio. (ĈIIC)

★ En septembro-decembro 2010 Steven Brewer instruas Eon en universitata kurso ĉe Universitato de Masaĉuseco, Usono. (*EAB Update*)

★ Ĉirkaŭ 60 anoj de la Pollanda IKUE-Sekcio partoprenis 16-17 okt la tradiciajn Preĝtagojn sur la Hela Monto — la mond fama Maria kultloko en Ĉenstoŝova. (Marian Łaba)

★ Unu jaron post la malfermo, en la propra paĝo de UEA en la socia retejo *Facebook* estas 1738 amikoj; plej multe el Usono (203), Brazilo (115), Francio (103), Italio (91), Hispanio k Pollando (po 85), Germanio (72), Meksiko (56), Argentino k Malajzio (po 50). (GK UEA)

## Ne! al la lingvoj en danĝero

### Dafydd ab Iago el Bruselo

La Eŭropa Komisiono (EK) decidis ne plu financi la asocion, kiu defendas malpli uzatajn lingvojn en Eŭropo. Pro ĉi tiu decido la Reto por Promociado de Lingva Diverseco (Angle: Network to Promote Linguistic Diversity, NPLD) ne plu ricevos financadon ekde la 1a de januaro 2011.

Eĉ pledoj de altrangaj politikistoj ne ŝanĝis la decidon de EK. La decido havos klarajn negativajn sekvojn por neŝtataj aŭ endanĝerigitaj lingvoj, kiujn parolas entute ĉirkaŭ dekono de la loĝantaro de la Eŭropa Unio (EU).

La ĉesigo de la financado estas logika sekvo de la ŝanĝo de la EU-reguloj en 2007. Projektoj defendantaj malmulte parolatajn lingvojn ekde tiam devas konkurenci kun aliaj lingvaj projektoj. Ne estas diferenco, kiam temas pri financado, inter subtenado de instruado de la angla aŭ defendado, ekzemple, de la soraba lingvo parolata en orienta Germanio de malpli ol 60 mil homoj.

NPLD fondiĝis en 2007 kun la celo repreni la torĉon kiun lasis fali la Eŭropa



José Manuel Barroso, prezidanto de la Eŭropa Komisiono, ne havas monon por lingva diverseco.

Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj (Angle: European Bureau for Lesser Used Languages, EBLUL). Pro la antaŭa decido de la Komisiono, EBLUL ne povis esperi je daŭra financado simple pro la fakto, ke dum preskaŭ 30 jaroj ĝi estas la sola eŭroponivela organizo por defendado de malpli uzataj lingvoj. En Bruselo oni taskigis la britajn funkci-

ulojn pri juraj demandetoj pri la leĝeco de financado de organizo protektanta endanĝerigitajn lingvojn.

Ĉiuokaze, funkciuloj en Bruselo parolas pri manko de “aldona valoro” kaj de “specifeco” en la asocio por lingva diverseco. “Ĝi estas maljuna. Pro tio ni estas elrevigitaj vidante ke la Komisiono ne financos ĝin”, — konfesas Meirion Prys Jones, prezidanto de NPLD. Prys Jones, kiu estas ankaŭ ĉefo de la Kimra Lingva Estraro, alvokas, ke EU faru la protektadon de malpli uzataj lingvoj grava tasko je EU-nivelo. La granda problemo por malgrandaj kaj neoficialaj lingvaj komunumoj estas, ke ili ne povas facile plenumi la kompleksajn postulojn de la EU-gvidantaro. Sen la asocio, kiu helpas ilin, estos por ili preskaŭ neeble fari subvencipetojn por siaj projektoj.

“Estas manko de konscienco en la Komisiono, kiam temas pri protektado de la lingva diverseco. Malfacilas graviĝi ĉi tiun ideon”, — diris spertulo, kiu ne volis vidi sian nomon en *La Ondo* pro tio, ke li multe laboras kun la Komisiono. Tiu spertulo diras, ke pro la tranĉado en la financado fare de EU, en Bruselo estos malpli da pledado por malpli uzataj kaj endanĝerigitaj lingvoj.

## I@E: La unua jubileo

Antaŭ kvin jaroj, 14 nov 2005, ĉe la Ministerio de internaj aferoj de la Slovaka respubliko estis registrita senprofita ne-registara junulara organizo E@I [elparolu: “e-ĉe-i”].

Tio estis grava kontribuo al profesiigo de esperantista laborgrupo, kiu formiĝis en 2000 en Svedio kaj kiu ekde 2003 estis faka sekcio de TEJO. Por emfazi la ĝeneralan lingve kaj teknologie edukatan karakteron kiun ĝi ekhavis, oni al ĝia oficiala nomo E@I krom *Esperanto ĉe Interreto* atribuis ankaŭ la signifon *Edukado ĉe Interreto*.

Ekde la unuaj projektoj, inter kiuj estis la hodiaŭ jam bone konata retpaĝaro *lernu!* por reta lernado de Esperanto, la organizo multon lernis, kaj la unuaj aktivuloj gvidataj de Hokan Lundberg ankaŭ sukcese transdonis siajn spertojn al nova generacio. E@I en 2010 estas aktiva ne nur en la kampo de seminarioj kaj interretaj projektoj. Ĝi efektivas ankaŭ sukcesan eldonan agadon: la DVD *Esperanto Elektronike* en 2006 aperis en la kvanto de 9.000 diskoj; la KD-Romo *Esperanto* eldonita en 2008 kune kun la urbo Bjalistoko aperis antaŭ la 94a UK en 400.000 ekzempleroj kiel senpaga aldonajo al la pola gazeto *Gazeta Wyborcza*. El eldonitaj libroj la plej nova estas la *Detala gramatiko de Esperanto*, origine verkita de Bertilo Wennergren por *lernu!* en elektronika formo.

La nuntempa kunordiganto de la E@I-agado estas la slovaka esperantisto Peter Baláž.

Por povi efektiviĝi sian agadon, E@I plene dependas de volontulaj kunlaborantoj, eksteraj subvencioj kaj mondonacoj de unuopuloj. Ekde la komenco la plej granda subtenanto de ĝiaj projektoj estas la fondaĵo Esperantic Studies Foundation,

sed lerta monpeta agado jam sukcesis certigi monon ankaŭ de la sveda IDO-fondaĵo (jes: Ido), de la FAME-fondaĵo kaj ankaŭ de Eŭropuniaj fontoj. Kelkajn seminariojn ebligis realigi la programo “Junularo” de la Eŭropa Komisiono; kaj en 2009 E@I sukcesis peti de la agentejo EACEA 256 mil eŭrojn por estrado de dujara projekto kun partneroj en pluraj eŭropaj landoj kies rezulto estos retejo por instrui la slovakajn lingvon al eksterlandanoj. Malgraŭ tio individua helpo de esperantistoj plu urĝe necesas por kelkaj tre gravaj projektoj, kiel starigo de interreta versio de la *Plena Ilustrita Vortaro*, jam kontraktita kun SAT, ĉar tiun laboron neniu alia ol la esperantistoj mem povas financi. La monokolekta kampanjo ĉe <http://www.vortaro.net> ĝis nun sukcesis gajni eĉ ne duonon de la bezonata sumo de 10 mil eŭroj por moderne prilabori kaj senpage rete serĉebligi la 50 mil vortarajn unuojn.

Tamen aperas novaj sukcesoj, kiuj ebligas al E@I plivastigi sian aktivularon. La ĉeĥa esperantisto kaj studento pri informadiko Marek Blahuš laboras ekde septembro 2010 ĝis majo 2011 en Nancio (Francio) kiel unua staĝanto de E@I, okupiĝanta plentempe pri E@I-agado. La kostojn de lia staĝo plene kovras la Eŭropunia fondaĵo ERASMUS. Liaj taskoj inkluzivas krom laboro pri diversaj komputil-lingvistikaj projektoj ankaŭ prezentadon de E@I dum Esperanto-aranĝoj en la regiono. E@I serĉas pliajn studentojn, kiuj interesiĝus simile gajni sperton staĝante por ĝi en eksterlando, helpante tiel samtempe al la Esperanto-movado. **E@I**

**Ne forgesu (re)aboni**

## Indonezio: Novaj Esperanto-klubo

Ekde la komenco de la pasinta jarcento estis esperantistoj en Indonezio. La Esperanto-agado tre viglis inter la du mond-militoj kaj en la kvindekaj jaroj ĝis la mezo de la sesdekaj jaroj.

De kelkaj jaroj mi esploras pri tiu movado, preskaŭ nekonata en la nuna Esperanto-mondo. Pasintjare mi unuan fojon instruis Esperanton en tiu grandega lando, kiu tiam havis nur manplenon da esperantistoj, plejparte havantaj neniujn aŭ tre malmultajn kontaktojn kun la ekstera movado. En septembro-oktobro ĉi-jare mi reiris al Indonezio por instrui kaj esplori pri la movada historio tie.

Ĉi tie mi volas rakonti pri la kluboj kreitaj dum tiu ĉi lasta vizito. En la ĉefurbo Ĝakarto kreigis la 3an de oktobro la klubo *Esperiga suno*. La estraro konsistas el Abdul Haris, Ilia Sumilfia Dewi kaj Edwina Roesmayanti. La klubo nun havas lecionojn du-foje monate en dimanĉo kaj la samajn lecionojn ankaŭ en merkredo, tiel ke la membroj havu pli da eblecoj ĉeesti. La lecionojn gvidas Haris kaj Ilia, kiuj ricevis subvenciojn de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado) por ĉeesti la Komunan Seminarion decembre en Vjetnamio.

Rijanto Husadha (dua viro de maldekstre sur la apuda foto), kiu eklernis Esperanton antaŭ pli ol duona jarcento, reentuziasmiĝis kaj ekde septembro instruas ĉiun merkredon al instruistinoj, direktoro kaj aliaj kadruloj de la privata lernejo *Kesatuan* en Bogor. Mi vizitis la grupon kaj gasteinstruis tie la 6an de oktobro. Tiukaze estis starigita la Esperanto-klubo *Ĉielarka revo*. Rijanto Husadha estis elektita kiel prezidanto. La direktoro de la lernejo, Jan Horas V. Purba (sur la foto la dua viro de dekstre), iĝis vicprezidanto, la lerneja respondeculo pri informadiko Ajie Bagus Kurnia (la unua viro de dekstre) iĝis kasisto, kaj unu el la instruistinoj, Asri Yuniar (la kvara staranta virino de dekstre), sekretario. Ne aperas sur la foto Pryo Handoko, plia estrarano, kiu antaŭ jaroj sola eklernis Esperanton kaj nun aktive tradukas lernu.net al la indonezia. Do du estraranoj ne apartenas al la lernejo, tiel garantiante ke la klubo funkcios por la tuta urbo, ne nur por la lernejo. Ili jam antaŭvidis lokon por biblioteko.

Mi instruis Esperanton en ok urboj, sur tri insuloj, kaj kompreneble ne eblis en ĉiu urbo tuj krei klubon. Estus ankaŭ vane insisti pri tio ĉe komencantoj aŭ eĉ ĉe nekomencantoj se ili ne jam sentas sin pretaj por tio. Tamen ankaŭ en aliaj urboj io okazis. Ekzemple en Semarang, Imam Prayogo jam de kelkaj monatoj gvidas grupon da studentoj, al kiuj mi donis lecionon la naŭan de oktobro. Ili nomis sian grupon *Espera arbo* sed preferas simple resti lernogrupon, kaj ne jam iĝi klubo kun estraro.

Sekvatage en Yogyakarta kreigis — ankoraŭ sennoma — klubo, kies estraranoj estas precipe universitataj studentoj: prezidanto Rahmat Hidayat, sekretario Dahlia E.P. kaj kasistino Ade Silviana Devi.

En pluraj aliaj urboj miaj lernantoj kaj aliaj entuziasmuloj (pere de la Facebookgrupo pli kaj pli da indonezianoj komencas lerni Esperanton memstare) daŭre lernas kaj esperas starigi klubon. Mia persona espero estas ke tiuj kluboj tiom fortiĝos ke ili estos kapablaj krei landan asocion.

Homoj kiuj iam korespondis kun indoneziaj esperantistoj, aŭ havas aliajn informojn pri la historio de la movado en Indonezio, bv. kontakti min rete: [heidi.goes@gmail.com](mailto:heidi.goes@gmail.com) aŭ letere: Heidi Goes, Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, Belgio. Koran antaŭdankon.

Heidi Goes



Jen la *Ĉielarka revo*.

## Interreta lingvolernado

**Multaj esperantistoj ŝatas lerni lingvojn, kaj interreto estas grandega helpo en tio. Jen diversaj lingvolernigaj retejoj — multlingvaj, anglaj, pluraj ankaŭ Esperantaj:**

**Por gustumi:** Legu artikolon pri la lingvo en Vikipedio [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org). Vidu kaj aŭdu gravajn frazojn ĉe [50languages.com](http://50languages.com) aŭ [travlang.com/languages](http://travlang.com/languages) (eblas lerni per Esperanto). Eĉ obskurajn lingvojn aŭdu ĉe [foreignlanguage-expertise.com/museum1.html](http://foreignlanguage-expertise.com/museum1.html).

**Kursoj:** Iuj senpagaj retaj kursoj tute kompareblas kun la pagendaj, ekz. la novgreka [kypros.org](http://kypros.org) aŭ la korea [korean.sogang.ac.kr](http://korean.sogang.ac.kr). Ne plu vendatajn kursojn foje aŭtoroj liberigas rete: [fsi-language-courses.org](http://fsi-language-courses.org). Rekomendatas retejoj dediĉitaj nur al unu lingvo, kiel [lernu.net](http://lernu.net) por Esperanto. Rektmetode eblas lerni ĉe [livemocha.com](http://livemocha.com).

**Vortaroj:** Multlingva vortaro surbaze de Esperanto estas [slovnyc.org](http://slovnyc.org). Liston de vortaroj vidu ĉe [yourdictionary.com/languages.html](http://yourdictionary.com/languages.html). Temajn vortarojn kaj 600 bazajn vortojn en multegaj lingvoj proponas [unilang.org](http://unilang.org). Ĝusta vortuzado estas serĉebla en la frazdatumbazo de [tatoeba.org](http://tatoeba.org). Elstara helpilo por parkerado estas la libera programo Anki [ichi2.net/anki](http://ichi2.net/anki).

**Gramatikoj:** Ankaŭ ili troveblas rete — ekzemple, PMEG [bertilow.com/pmeg](http://bertilow.com/pmeg) por Esperanto. Konjugacii verbojn de pli ol 50 lingvoj scias [verbix.com](http://verbix.com).

**Prononco:** Denaskulajn registraĵojn de vortoj provizas [forvo.com](http://forvo.com) kaj ĉe [rhinospike.com](http://rhinospike.com) eblas peti aliulon registri por vi frazon.

**Legkompreno:** Post klako de vorto en teksto ĉe [lernu.net](http://lernu.net) tuj aperas traduko. La samon por ajna retpaĝo kaj kelkdek lingvoj scias [wordchamp.com](http://wordchamp.com) (klaku supre la kvaran menueron). Fremdlingvaj gazetojn legu ĉe [news.google.com](http://news.google.com), literaturon ĉe [gutenberg.org/catalog](http://gutenberg.org/catalog). Simpligitajn tekstojn ofertas [lingq.com](http://lingq.com).

**Aŭdkompreno:** Sonlibrojn aŭdu ĉe [libriovox.org](http://libriovox.org) — liberajn, senpagajn kaj diverslingvaj. Komencantoj ŝatos la videojn kun diverslingvaj subtekstoj en [dotsub.com](http://dotsub.com). Subtekstojn por via ŝatata filmo elŝutu de [filmoj.net](http://filmoj.net) (Esperante) aŭ [opensubtitles.org](http://opensubtitles.org).

**Skribado:** Ĉe [lang-8.com](http://lang-8.com) aŭ [busuu.com](http://busuu.com) denaskuloj senpage korektas viajn tekstojn.

**Parolado:** Partnerojn por paroli skajpe [skype.com](http://skype.com) serĉu ĉe [www.italki.com/?hl=eo](http://www.italki.com/?hl=eo). Pagendajn instruistojn ĉe [myngle.com](http://myngle.com) aŭ [edufire.com](http://edufire.com).

**Forumoj:** Lingvemuloj diskutas en retaj forumoj kiel [learnlangs.com/lingvoforumo](http://learnlangs.com/lingvoforumo) (Esperante) aŭ [unilang.org/forum](http://unilang.org/forum) (angle pri lingvaĵoj) kaj [how-to-learn-any-language.com/forum](http://how-to-learn-any-language.com/forum) (angle pri lernmetodoj).

Judith Meyer



# Kiel esperantistoj perdas sian komunumon

de Zbigniew Galor

**C**erte vi aŭdis, Kara Leganto, ke la vojo al la fina venko per ĉiutaga instruado de Esperanto estas plena de embarasoj, penoj kaj rezulte ĝi estas nek tro efika nek certa. Sume, ne tro alloga. Male al ideo de alia vojo, kompreneble libera de tiuj ĉi limigoj: jen politikistoj decidas, ke Esperanto estas devige instruata. Tio sendube devas okazi dank' al instigo de esperantistoj. Imagata skalo de la “fina venko” — urba, regiona, landa, interlanda, kontinenta, monda — dependas nur de iliaj ambicio kaj sento de politika realeco. Apartenas al la imagoj ankaŭ historia alvoko de esperantistoj al la ĉinia estraro: ĝi decidu, ke Esperanto iĝu la dua lingvo de ĉinoj. Sur tiu ĉi fono la ideo, ke la pollanda parlamento/registaro decidu, ke Esperanto estu devige instruata en pollandaj lernejoj, estas eĉ modesta. Tion celas la unua flanko de “pola hejma milito” — tiel sensacie nomita estas la diskuto en *Libera Folio*. La diskuto elvokis sintenojn malproksimajn de provo kompreni la konflikton, kiu esprimiĝas en ĝi. Tamen la konflikto malkovras sian ideologian fonton, devenantan el la ĝisnuna evoluo de la Esperanto-movado, kaj montras, kiel disfalas la (landa) Esperanto-komunumo. Ne pravus tiuj, kiuj traktas ĝin kiel absurdajon aŭ kiel nur “internan aferon” de poloj.

## 1. Kontraŭdiroj kaj konfliktoj

Historio de la Esperanto-movado estas ankaŭ historio de kontraŭdiroj kaj konfliktoj. Ido-skismo, puĉo en Hamburgo, konflikto en CO aŭ afrika konflikto — kelkaj ekzemploj pli konataj. Ekzistas ankaŭ histori-ideologiaj kontraŭdiraj tendencoj kune kun distingo je neŭtrala/politike engaĝiĝinta, dekstra/maldekstra k.a.. Krom ili okazas “kvereloj” en Esperantaj kluboj kaj asocioj malproksime de centroj. Tiuj ĉi malofte eliras en lumon tagan.

La “kverelo” en la Pola Esperanto-Asocio iĝis jam malfermita konflikto. Kaj la konflikto mem elvokis rimarkon de eksterlandaj esperantistoj. Ĝi aktivigis ankaŭ kelkajn personojn (kaj la Civiton), por kiuj la konflikto estas nur preteksto ironie priridi siajn “deĵorajn” kontraŭulojn. Indas memori, ke ironio estas principe esprimo de senarmeeco. Vidiĝas ankaŭ troigo, karakteriza por (kultura kaj politika) Esperanta folkloro kies reprezentato iĝis A. Künzli, svisa esperantisto kaj historiisto, nenion komprenanta en la konflikto kaj en la pollanda realeco, sed senhezite instruanta la pollandan ŝtatprezidanton, kiumaniere li punu la malbonan PEA, kaj kion faru la membroj kaj la prezidantino de PEA.

## 2. Aferoj kaj homoj

La esenco: kelkaj esperantistoj kreis Iniciatan Grupon Esperanto por EU (IGEEU), kiu celas enkonduki devigan instruadon de Esperanto en pollandaj lernejoj per decido de la pollanda registaro. Ili konstatas, ke tio estas ununura efika vojo por evoluigi la lingvon, ĉar PEA (kaj UEA) nenion faras.

Homoj, kiuj tiel opinias estas (krom F. Witucki) membroj de PEA: E. Kozyra (vicprezidanto de PEA!), K. Krzyżak, S. Rynduch (dumviva membro). Iliaj kritiko kaj akuzoj rilatas al la prezidantino de PEA, H. Komar, kaj al la apogantaj ŝin membroj de PEA.

En ĉi-jara ARKONES (24–26 sep, Poznań), dum konfronto evidentiĝis, ke por ambaŭ flankoj la kaŭzo de la konflikto estas malsama. Por la prezidantino la kaŭzo estas leteroj senditaj de IGEEU al altaj reprezentantoj de la pollanda politika vivo, kiuj, laŭ ŝi, estas neformalaj, kompromitaj por la Esperanto-movado. Por la IGEEU tio estas ofendaj karakterizoj de ĝiaj membroj disvastigataj far Komar. Do, laŭ la prezidantino la kaŭzo devenis de la agado de la grupo en neesperanta medio. Laŭ la grupo ĝi estas ligita kun ŝia personeco.

Ankaŭ la ebleco solvi la konflikton estis malsame vidata. S-ino Komar konstatis, ke ŝi ne komprenas la agojn kiuj celas konstrui domon komencante de tegmento. S-ro Krzyżak diris, ke la kondiĉo estus ĉesigi ofendadon de la grupanoj. La konstato de la prezidantino signifis, ke ŝi ne vidas eblecon solvi la konflikton.

## 3. Tri konfliktoj

Sub nomo de la “pola hejma milito” ekzistas tri fundamentaj konfliktoj, ĉiuj *en ekstrema formo*: 1) ideologia konflikto; 2) organiza laborkonflikto; 3) personec-konflikto. La bazan rolon ludas ĉi tie la ideologia konflikto.

*La ideologia konflikto* estas historia produkto de la Esperanto-movado kaj rilatas al du ĉefaj tendencoj. Ambaŭ devenas de malsamaj respondoj al tre praktika demando: kiel progresigi la lingvon en la socio, en la mondo? La unua respondo baziĝas sur senĉesa popularigado, t.e. instruado de Esperanto (influoj de Zamenhof, Lanti k.a.). La dua rilatas al konvinko, ke Esperanto iĝos akceptata mondscale, aŭ plimalgrandscale (ekzemple, en Eŭropo aŭ en iu lando) rezulte de decido politika de gravaj ŝtataj institucioj, internaciaj organizaĵoj (influoj de Hodler, Privat k.a.). Ĉe la unua kazo plej gravas desuba aktivado de esperantistoj, kiuj mem kreas bezonon, instigante

aliajn. Ĉe la dua sufiĉas desupra aktivado de Esperanto-elito kaj politika decido enkonduki Esperanton (ekzemple, en ĉiujn lernejojn), kiu kreas oferton. Oni povas nomi tiujn ĉi tendencojn desuba/desupra, aŭ bezona/oferta.

Edward Kozyra, la motoro de la grupo, celanta aparteni al la partio EDE (Eŭropo — Demokratio — Esperanto), kiu celas enkonduki Esperanton en eŭrop-uniajn strukturojn, estas certa, ke tiuspeca politika decido (ekzemple, de la pollanda parlamento) elvokos edukadon de amaso da Esperanto-instruistoj. Ne havante bazan scion pri la Esperanto-edukado en Pollando, li senhezite prezentas falsan bildon pri ĝi (kiel montris tion I. Koutny koncerne al universitataj kursoj).

La organiza laborkonflikto rilatas al fakto, ke la membroj de la iniciata grupo — samtempe membroj de PEA — kaj la prezidantino de PEA laŭ la organizaj (statutaj) principoj devas kunlabori baze de sama organiza politiko (ĉi-kaze desuba). Tamen la grupo akceptas tute kontraŭan politikan aliron al la disvastigado de la lingvo — desupran. La pezeco de ambaŭflankaj akuzoj atestas, ke okazas akra batalo pri organiza potenco (en majo devas okazi baloto en PEA).

La konflikton nutras ankaŭ kontraŭdiro inter du preferataj formoj de organiza agado: senperaj kontaktoj flanke de la prezidantino (kaj ligitaj al ŝi esperantistoj) kaj peraj kontaktoj flanke de la grupo de E. Kozyra — agado pere de “leteretoj”.

*Konflikto de personecoj.* Nur kun granda ĝeneraligo eblas diri, ke en la konflikto s-ino Komar ŝajnas reprezenti tipon de principulo kaj s-roj Kozyra, Krzyżak, Rynduch tipon de pragmatikulo, por kiu kuranta celo estas pli grava ol la akceptataj principoj.

#### 4. Eŭrovenko?

Kiel eblas, ke ĝuste en Pollando tiom forte en absolute ekstrema formo aperis la desupra tendenco danĝera por la malfacile atingita unueco de la pollanda Esperanto-organizaĵo? Favoras al ĝi fenomenoj eksteraj kaj internaj. Al la unuaj apartenas la plilarĝigo de EU kaj la rezultoj de sistema transformo.

La evoluo de EU elvokis ĉe esperantistoj esperojn je “rapida eŭrovenko”: Esperanto iĝu eŭropunia lingvo (aŭ/kaj eŭropa identigilo laŭ la ideo de Z. Tišljar). Similan rolon la evoluo de EU plenumas en neesperantista medio, EU estas tie traktata kiel solvo de ĉiuj problemoj en la nov-aliĝintaj ŝtatoj.

Parto de esperantistoj vidas en la nova realeco la plenumon de historia justeco kaj ne kapablas pensi pri sociaj fenomenoj alie ol per emocioj. Tiun sintenon plifortigas idealismo kiel plej populara memidenteco de plej multaj esperantistoj. Ilia aliro al socio rezultas i.a. forme de specifa interpreto de la konstato: “Ni vivas en demokrataj cirkonstancoj kaj ni devas ankaŭ tiel agi”, — tiel Rynduch argumentas en *Libera Folio* pri la neebleco akcepti malpermesojn devenantajn de “gvidanta funkcio” en PEA. Sed politika demokratio en ŝtato ne estas la sama kiel organiza demokratio. Krome, ambaŭ enhavas rajtojn kaj devojn! La aŭtoro de la supra konstato ŝajne pensas pri libereco kaj demokratio laŭ la modelo de *liberum veto* (pasinta formo de individua pola parlamenta libereco, limigita nek fare de aliaj parlamentanoj, nek per iuj ajn principoj).

Al la internaj fenomenoj apartenas: senorientiĝo pri la komunumo kaj movado kaj kontraŭdiro inter la “vera socio” kaj “help-socio” (laŭ la iama termino de S. Révész).

Ĉu esperantistoj kreas komunumon aŭ movadon? Senorientiĝo pri tio estas elemento de la nuntempa Esperanto-medio. Sian rolon en la formado de tiu ĉi stato ludas la raŭmista ideologio, pli ofte prisilentata ol kritike analizata en UEA. Paradigmo de la “bona” komunumo kiel konkurenca al



“Kune estas pli facile” (P. Sperling el foto.recenzja.pl)

la “malbona” movado, influis ankaŭ la konscion de UEA-membroj. Kune kun la falo de la Berlina Muro komenciĝis kolapso de la ĝisnuna Esperanto-komunumo en Pollando kaj en aliaj landoj. La nun ekzistantaj Esperanto-komunumoj estas malfortaj. Plimalfortigas ilin ankaŭ idealisme blindaj, sed bonintencaj, agoj de desupristoj, kiuj ne bezonas la Esperanto-komunumon por evoluigi Esperanton! Desupristoj bezonas nur favorajn politikistojn. La Esperanto-komunumo estas plimalfortigata pli forte, se desupristoj mem — kiel kaze de la pola konflikto — estas membroj de la Esperanto-komunumo.

Se la Esperanto-medio estas speco de “helpsocio”, tio signifas ke Esperantujo servas kiel helpo en realigado de sociaj roloj (ekzemple: de politikisto, poeto, instruisto ktp.), kiujn esperantistoj en sia propra “reala socio” iel efektiviĝi ne povas, kvankam volas. Tio signifas, ke en la esperantista “helpsocio” oni devas distingi ankaŭ interesojn de tiuj, kiuj strebas kompensi mankojn de sia neesperantista vivo, ankaŭ en netipaj formoj, kiuj povas esprimiĝi kiel ekzotikaj, folkloraj por la Esperanto-medio.

Tre favora cirkonstanco por netipaj agantoj estas malfortigo de la komunuma ligo inter esperantistoj, t.e. samtempe plimalfortigo de la kontrola funkcio de la komunumo. La pola konflikto montras, ke perdo de la komunuma ligo rezultas el realigado de desupra socipolitika tendenco traktata kiel ekstreme, absolute, fundamente kontraŭa rilate al la desuba tendenco. Tion akompanas neglekto de iuj ajn organizaj principoj.

La tiel nomata “pola konflikto” nek reduktiĝas al la polanda aspekto, nek la pollanda aspekto estas la plej grava. La konflikto esprimas desupran tendencon — aspekton de la monda Esperanto-movado.

### INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando

[iesperanto@versatel.nl](mailto:iesperanto@versatel.nl)

[www.iei.nl](http://www.iei.nl)

**vendas proprajn eldonaĵojn, interalie:**

*Vortoj de Andreo Cseb* . . . . . € 15,-

*Vivo de Andreo Cseb* . . . . . € 18,-

*Konversacia vortaro* . . . . . € 13,-

verkoj de Edmond Privat

**kaj aliajn novajn kaj brokantajn librojn**

# Omo, la lingvo de homo

de Halina Gorecka

## LA UNUA LIBRO

Antaŭ cent jaroj, en oktobro 1910, en la presejo de Jakov Ŝubin en la Urala urbo Jekaterinburg aperis broŝuro *Projekto de scienca kaj internacia lingvo*. Ĝia aŭtoro, pentristo Vladimir Vengerov, naskiĝis la 28an de aŭgusto 1883. En sia junaĝo li studis eksterlande, sciis fremdajn lingvojn kaj jam kiel junulo ekserĉis vojon al tuthomara lingvo.

Ekloĝinte en Jekaterinburg, Vladimir Vengerov pentris, instruis pentroarton, partoprenis en ekspozicioj (liaj pejzaĝoj estas en la muzeo de tiama gubernia ĉefurbo Permĵ), okupiĝis pri fotado kaj fotoarto, prespretigis bildkartojn.

Vengerov aperigis sian unuan libron en la 27-jara aĝo, same kiel Zamenhof. Ankaŭ lia broŝuro estas modesta: 51 paĝoj, formato 12×17 cm, griza kovrilo. Vengerov dissendis ĝin al akademioj, bibliotekoj, societoj; ankaŭ al potenculoj, interalie, al la Imperiestra Kortego.

La aŭtora moto tekstas: “La lingvo devas esti preciza, kompleta, bela kaj facila vorta esprimilo de la interna mondo de homo kaj, samtempe, konciza, racia, fleksebla kaj facile lernebla en sia teknika flanko”.

Ĉu iu etna lingvo estis/estas tia? Vengerov detale ekzamenis la eblecon apliki lingvojn etnajn kaj listis amason da faktoroj malhelpantaj al ili iĝi vere racia lingvo: pozicia legado, nefonetikeco, superflua kvanto de signoj kompare kun la fonemoj, homonimeco, sinonimeco, plursenceco de radikoj.



Vengerov precipe kritikis la fenomenon, kiun li nomis “historiismo”, t.e. deflankiĝo de la enhavo for de ĝia formo kaj de la origina motivigo. Li skribis: «“Pater” patro, devenas de la vorto “Pa” gardi kaj signifas “gardisto”; “bhratar” frato signifas “portisto”, “peka” rivero — “fluanta”, “beper” bordo — “gardanta”. Kun tempopaso frato ne plu estas portisto, kaj bordo ne gardas... Preskaŭ ĉiuj antaŭaj aspektoj formortis por ni, kaj ni eĉ ne scias ĉiujn el ili. Ni konservis la formojn, sed ili jam estas malplenaj, ni aplikis al ili nian enhavon, sed tion ni nenie difinis, per nenio esprimis».

Ĉi tiu ideo estas malofta, eble eĉ unika en interlingvistiko.

Analizinte la etnajn lingvojn, Vengerov proponis sian propran projekton kaj skizis ĝiajn principojn kaj regulojn.

## LA DUA LIBRO

La eldonon de la unua broŝuro sekvis la Unua Mondmilito, du revolucioj kaj interna milito en Ruslando. Nur meze de la 1920aj jaroj Vengerov reaktiviĝis, kaj lia 241-paĝa libro *Omo — lingvo de la homo: Kurso de tutmonda lingvo* aperis en Sverdlovsk (la bolŝevista urbanomo de Jekaterinburg) en la 1927a jaro.

La 60-paĝa unua parto estas dediĉita al la ĝenerala strukturo de lingvoj. Post pritrakto de la etnaj lingvoj, Vengerov prezentis la historion de la lingvoprojektado kaj, interalie, ripetis la kutimajn kritikojn al Esperanto kaj Ido.

Sekvas *Gramatiko kaj ekzemploj de la lingvo Omo*. La bazan gramatikon Vengerov esprimis sur tri paĝoj en ses tezoj: logika, leksika, fonografia, etimologia, sintaksa kaj taktika. Poste sur kvindekda paĝoj li donis klarigojn kaj ekzemplojn, kiujn ni resumas ĉi-sube.

### 1. Fonetiko kaj grafiko

La sonsistemon de Omo konsistigas 25 fonemoj, esprimataj per 25 respektivaj literoj: 5 vokaloj kaj 20 konsonantoj (inkluzive la duonvokalon “y”). La vortoj havas akcenton sur la antaŭlasta silabo. La alfabeto ekzistas en du skriboj.

La latina:

A, B, C, D, E, F, G, H, I, J [j], K, L, M, N, O, P, Q [ĉ], R, S, T, U, V, X [ŝ], Y [j], Z.

La Oma literaro:

а б в г д е ж з и к л м н о п р с т у ф х ц ч ш щ ъ ѓ

### 2. Leksiko

En la antaŭparolo al la Omo-rusa vortaro (ĝi okupas duonon da libro) Vengerov klarigis siajn principojn. Unue li devis “evidentigi memstarecon kaj internan kunligitecon de tiu aŭ alia grupo da nocioj, kiujn eblus kunligi inter si per unu bazo”. Laŭ modelo de la scienca terminologio, Vengerov formis semantikajn grupojn kaj difinis la titol-vorton, kiu plej logike kaj kun pleja oportuneco servis kiel elirpunkto por la tuta grupo, ekzemple: *varm* por varmeco, varma, varmvagono, varmigi, varmego, malvarmigi, malvarmo, malvarmigilo, temperaturo, kalorio ktp. Okaze de trolongeco estis enkondukataj neologismoj: atmosfermovo — vento.

La konkretaj formoj de la titol-vortoj estis elektataj laŭ jenaj kriterioj:

— maksimuma esprimebleco;

— akceptiteco de la formo kiel scienca termino;

— maksimuma disvastiĝo kun tiu ĉi aŭ parenca signifo;

— oportuneco en aplikado en diversaj kunmetoj;

— mallongeco;

— belsoneco;

— facileco de prononcado.

### 3. Morfologio.

Vengerov prezentis logikan sistemon kun pluraj propraj terminoj, sed ni priksribu ĝin per la tradicia aparato.

3.1. Substantivo estas formata el la titol-vorto per la finaĵo —o, kiu povas esti ellasata: *bosko* arbaro, *qiel* ĉielo, *xton* ŝtono, *lomo* homo. Pluralo estas formata helpe de la finaĵo —i, *xtoni*, *lomi*, *boski*. Akuzativo havas la finaĵon —n, kiu ne estas deviga kaze de la rekta vortordo. La gramatika genro mankas. Ekzistas nur la difina artikolo *la*.

3.2. Adjektivo havas la finaĵon —a. Adjektivoj akordiĝas kun substantivoj nek kaze, nek nombre: Verda kverki (verdaj kverkoj); Mi vidas ruda koloro (Mi vidas ruĝan koloron).

La komparativo estas formata per *plu* ... *kam* kaj *maplu* ... *kam*: Su es plu bona, kam tuo (Ĉi tio estas pli bona ol tio); Ti logas maplu, kam li (Vi loĝas malpli fore ol li).

La superlativo estas formata per *pley* kaj *mapley*: Pley bona parko in la urbo.

### 3.3. Verbo.

La aktiva verbo en infinitivo finiĝas per —ey, la pasiva per —ety: lektey (legi, esti leganta), libey (ami, esti amanta); lektety (esti legata), libety (esti amata).

Estas ses finaĵoj de indikativo: la aktivaj estas la Esperantaj —as, —is, —os; sed krome estas tri pasivaj —at, —it, —ot: ni

portat (ni estas portataj), vi portit (vi estas portitaj), zi portot (ili estas portotaj).

La ĝenerala kopulo estas *es*, kiu havas ankaŭ tempajn formojn: *as, is, os*.

Li es gaya = Li estas gaja (ĝenerale).

Li as gaya = Li estas gaja (en la nuna momento).

Nej os akvo = Neĝo estos akvo.

Oni povas uzi ankaŭ la formojn *esis, esas, esos*. Ekzemple: Mi esis in teatro.

La finaĵo de imperativo estas *-u*. Ekzemple: Portu akvo. Por montri ĝustan tempon oni povas aldoni antaŭ la finaĵo *-u* la tempindikojn: *a, i, o*: kantau = kantu nun, sendou letro = sendu (poste) leteron, punitu = estu punita.

Kondicionalo estas formata per la finaĵo *-us*. Same oni povas aldoni la tempindikojn *a, i, o*: Se le prometius, le venaus = Se li promesus (en pasinto), li (nun) venus.

Participo estas formata el verbo per la ses finaĵoj same kiel en Esperanto: *-anta, -inta, -onta; -ata, -ita, -ota*.

3.4. Personaj pronomoj: *mi* mi, *ti* ci, *li* li (ĝenerala), *le* li, *lu* ŝi, *lo* ĝi; *ni* ni, *vi* vi, *zi* ili (ĝenerala), *lei* ili (vira), *lui* ili (virina), *loi* ili (nevivaj). Senpersona pronomo *on*: On parlas = Oni parolas. Posesivo formiĝas per la aldono de la finaĵo *-a* al la persona pronomo. Korelativoj estas bone sistemigitaj en tabelo.

3.5. Numeraloj. Nul, un, du, tri, kvar, kvin, sis, sep, ok, nay, dek, 11 unoun, 12 unodu ... 19 unonay, 20 dudek, 21 duoun ... 29 duonay, 30 tridek ... 90 naydek, 100 cent, 101 centoun, 110 centodek... Por pli grandaj oni uzas dividon je triciferaj kategorioj de dekstre maldekstren, kiuj nomiĝas *qo*: la unua (ĝis mil) *unqo*, la dua (miloj) *duqo*, milionoj *triqo* ktp. Ekzemple, 13.457.040 unotri

trio kvarokvinosep duqo nulokvaronul (unqo).

3.6. Prepozicioj, subjunkcioj, konjunkcioj en Omo grandparte similas al tiuj en Esperanto kaj Ido.

3.7. Vortfarado en Omo okazas per vortkunmetado kaj afiksado. Aglutineco permesas vaste uzi prefiksojn (23) kaj sufiksojn (66). Kelkaj estas tre nuancitaj: *-mo* (monato laŭ la ordo), *-to* (tago de semajno), *-uk* (resto) ktp.

4. Sintakso. Omon karakterizas manko de akordigo inter substantivo kaj adjektivo, nedeviga uzo de la akuzativa finaĵo. La vortordo kutime estas rekta.

Sur deko da paĝoj Vengerov donas modelajn frazojn en Omo. Inter ili estas tute simplaj (“Bona mateno, syor!” — “Yel”, rediris le. — “Kil ti fartas?” — “Dank, bone!”) kaj iom malfacilaj, kiel ĉi tiu: Mi tivis promeney ne pro, ke mi ziris tuo, mer nur pro, ke algis mia kapo (Mi iris promeni ne pro tio, ke mi deziris tion, sed pro tio, ke doloris min la kapo).

Fine de ĉi tiu sekcio estas fragmento el la novelo “Vesperoj en bieno apud Dikanjka” de Nikolaj Gogolj:

*Qarma es luvo Dnopr, kany as kalmo, kany libere, legate ripigas li inter boski te monti sian akvin plenega. Nik ekmove-tas, nik raketetas, ti garas — qa tivas — (ot) ne tivas lia largajo mayesta, te es sembas, ke tuta li es muldita dal vitro te ke blua spegula voyo nemezurebla sur largo, senfina sur longo, serpentalijas in verda mondo. Tany es plaqe al zolo termega cirkarey de alto te plonjey radi en matermo del akvo vitrala, te — al qeborta boski klare revidey sin in luvo.*

## OMYAT

Por ligi la adeptojn de la nova lingvo (omoni) kaj propagandi ĝin estis kreita Omyat kun Centromyat kiel la organo. En la *Dua Libro* estas “Prastatuto del Omyat” (29 t. 8 m. 1925 y.) kaj aliĝilo.

La 2000-ekzemplera libro estis vendata en librovendejoj de Sverdlovsk. Plurajn ekzemplerojn Vengerov dissendis al institucioj kaj eminentuloj. En Sverdlovsk li reklamis sian lingvon per afiŝoj kun jena teksto: “Ĉiu homo devas paroli en la komnehoma lingvo Omo! Lernu, propagandu kaj vivigu ĝin!” En la Sverdlovska presejo *Granit* aperis poŝtkarto kun la rusa teksto “Lernu la komune homan lingvon Omo — la plej simplan, precizan kaj racian”.

En 1928 N.F. Kurenŝĉikov eldonis serion da poŝtkartoj kun Uralaj naturbelaĵoj, ĉiu en la kvanto de 5000 ekz. Probable la fotojn pretigis Vengerov, kiu multe vojaĝis en la Uralaj montoj kaj



Vladimir Vengerov, la aŭtoro de Omo

arbaroj. Jen kelkaj titoloj: №9. Monto Kaĉkanar; №12. “Sep fratoj” [rokoj]; №76. Insulo sur la Iseta lago; №92. Rivero Ĉusovaja. Ŝtonroko Olenij...

Tiuj bildkartoj ĝis nun reaperas en Uralaj brokantejoj. Sur ĉiu poŝtkarto estas reklamoj de Omo: “Malgrandaj amikaj penoj por helpi la lingvon Omo kreos kaj evidentigos grandegajn valorojn”; “Senescepta logikeco de la lingvo Omo kreos neprecon de ĝia disvastigo kiel lingvo scienca kaj komunehomara”; “Interesoj de mastrumado, politiko, scienco, arto, interesoj de la homo kaj de la homaro postulas rapidegan disvastigadon de la universala lingvo Omo”; “La tasko de la momento — ĉiamaniera evoluigo de la internaciaj ligoj. Organizu lernejan kaj grupan instruadon de la lingvo Omo”...

Vengerov sukcesis interesi samurbananojn pri Omo. Laŭ Viktor Kloĉkov, al Omyat aliĝis ĉirkaŭ mil membroj. En Sverdlovsk funkciis rondetoj por lerni Omon. Historiisto Arkadij Korovin rakontis, ke en 1934–35 en lia lernejo instruisto Pavel Pervuŝin gvidis Omorondeton. Kalerija Kronaĉeva rakontis siajn impresojn pri la konatiĝo kun Vladimir Vengerov en 1938: “li estis laca, afliktita kaj ofendita pro la multjara senrezulta batalo kun la potenculoj por la vivo kaj agnosko de sia kreaĵo”.

Vengerov estis tre klera; li ofte vizitis legejon de la regiona publika biblioteko. Li registris patenton (№295 de 19.11.1926) de “kalkulcirklo” por akordigi la rusan kaj metran sistemojn kaj proprakoste eldonis ĝin. Sur ĝia kovrilo ni trovas reklamon: “Lernu la vere homan lingvon Omo. Omo malfermas plej grandajn atingojn”. Li laboris kiel fotisto, kiel ekonomiisto en planorganizaĵo, fine



en la Biologia Instituto de la Akademio de Sciencoj. Vengerov kunaŭtoris la libron *Arbaroj de Uralo* kaj la revuon *Arbara mastrumado*.

## ĈU DESUBE AŬ DESUPRE

La antaŭmilitaj, dummilitaj kaj la unuaj postmilitaj jaroj estis malfavoraj por la planlingvaj movadoj. Nur post la morto de Stalin, Vengerov reprovigis atenti pri Omo. Li sendis leterojn al la Centra Komitato de la KPSU, al Kongreso de KPSU. Funkciulo el CK de KPSU responde rekomendis al la Sverdlovskaja regiona partia komitato kontakti kun Vengerov. Post liaj klarigoj, la regiona komitato siavice rekomendis al la estro de la filologia fakultato de la Urala ŝtata universitato kontakti kun la aŭtoro. Sed tio donis nenian rezulton.

Vengerov komprenis, ke disvastigo kaj uzado de internacia lingvo en nur unu urbo estas sensenca, sed aliloke mankis propagandistoj de Omo. Li do provis agi desuprisme. La 18an de februaro 1959 li skribis al la Tutmonda Packonsilio, ke “necesas agnoski la rajton de ĉiu homo je libera esprimado kaj senpera interkompreniĝo” por kio urĝe necesas “finprialaboro kaj enkonduko de unueca tuthomara lingvo aldone al la naciaj lingvoj, kiel garantio de rapida klerigado, komuna progreso de kulturo kaj vera feliĉo de la homaro!” Li leteris al Nikita Ĥruŝĉov, al la ĵurnalo *Pravda*, al eksa ĉefsekretario de CK de la Taĝikistana Komunista Partio akademiano Babaĝan Gafurov (tiutempe direktoro de la Orientologia instituto de la Akademio de Sciencoj).

Al Dmitrij Panov, direktoro de la Instituto de scienca informado, Vengerov proponis aldoni la principojn de Omo al la aŭtomatigado, kiu “rapide evidentigus malakordojn en la terminologio, sugestus necesajn formojn kaj forte proksimigus momenton de la unuigo de la homaro per la komuna lingvo...”.

Li ricevis ne nur rifuzojn, sed ankaŭ pozitivajn taksojn, interalie, de la Hungaria kaj Uzbekistana Sciencaj Akademioj. Sed li jam estis maljuna. En 1958 kun Vengerov kontaktiĝis Vsevolod Stepanov el Leningrad, kiu eklaboris pri evoluigo de Omo. En sia letero al Vengerov li skribas: “Kolosa estas la amplekso de laboro necesa por kompleta efektivigo de Viaj ideoj”.

Vladimir Vengerov mortis 29 jul 1959. Lia Omo havis la sorton de multaj aliaj projektoj. Nun ĝi estas konata al negranda nombro de interlingvistoj, sed la strebado de Vengerov praktike servi al la homaro meritas estimon.

# La kuracista sinkompreno de Zamenhof

## Nekonata Zamenhofa teksto retrovita

Eĉ pli ol 90 jarojn post la morto de Zamenhof disfoje ankoraŭ emergas nekonataj korespondoj. Sed okazas ankaŭ, ke ali-kategoriaj tekstoj eskapis la kolektojn de Dietterle (1929) kaj Itô Kanzi (PVZ). Precipe la unua devintus sisteme traserĉi ĉiujn eldonaĵojn inter 1887 kaj 1917 por certi, ke nenio el la plumo de Zamenhof preterglitis.

Ni prezentas tekston el 1909, kiun evidente ankaŭ la Zamenhof-biografioj de Korĵenkov (2009) kaj Künzli (2010) ne konas. Ĝi montras la idealisman sintenon de Zamenhof ankaŭ en rilato al lia profesio, en epoko, kiam la medicino ankoraŭ ne degeneris al industrio kaj sekve al grava faktoro ekonomia. Ĉu hodiaŭ li dirus la samon?

Reinhard Haupenthal

## Antaŭparolo

La medicino apartenas al tiuj sciencoj kaj profesioj, kiuj pli ol ĉiuj aliaj havas karakteron pure “homan”. La kuracisto havas antaŭ si ĉiam nur homon, kiu bezonas lian helpon kaj lin ne interesas, al kiu gento aŭ lando la kuracisto apartenas. Ne sole fremdlanduloj, sed ofte eĉ rekte militantaj malamikoj de lia nacio turnas sin konfide al kuracisto, kaj li ne havas la rajton rifuzi aŭ eĉ gradigi sian helpon pro ia nacia simpatio aŭ antipatio.



Tial ordinare en nenia alia klaso da homoj la idealoj pure homaj trovas tiom multe da partianoj, kiom inter la kuracistoj. Kaj la plej fundamenta el tiuj idealoj, la reciproka kompreniĝado inter la homoj, trovis ĉiam multe da amikoj inter la kuracistoj.

Multaj malsanuloj ofte spertas sur si mem, kiel grava ĝi estus, ke medicina helpo konu neniajn lingvajn barojn. Forigon de tiuj baroj celas la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio, kies fondiĝon ni ĝoje salutas. La asocio alportos grandan utilon al la medicina scienco, al la kuracistoj kaj al la malsanuloj.

L. L. Zamenhof

(Laŭ *T.E.K.A.-Jarlibro. 1909. I. vol. Kötzschenbroda-Dresden: Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio, 1909, p. 7.*)

Ĉi-sube estas reproduktitaj la titolpaĝo de la jarlibro de TEKA kaj la sepa paĝo kun la antaŭparolo de Zamenhof, kiujn ni aperigas, danke al kolego Haupenthal, okaze de la Zamenhofa Tago.





# Poemoj de Nikolaj Nekrasov

Nikoláj Alekséjeviĉ Nekrásov (1821–1878), filo de malriĉiginta rusa nobelo-armeano kaj klera polino (fraŭline Helena Zakrzewska) kutime estas nomata la plej granda rusa popola poeto. Efektive, en siaj poemoj, precipe en la 5000-versa poemego *Kiu bone vivas en Rusujo* (1863–1877) li ne nur prezentis vastan panoramon de la kamparana Ruslando, sed li faris tion per lingvo tre proksima al la popola, tamen ne primitiva, sed esprimriĉa kaj belsona. Liaj poemoj *Patrujo* (1846), *Poeto kaj civitano*, *Saŝa* (1856), *Kolportistoj* (1861), *Rusaj virinoj* (1872), *Al semantoj* (1876) kaj aliaj estis popularaj en tiutempa opozicia “demokratia” movado.

Multaj versoj el la popolecaj kaj civitanaj poemoj de Nekrasov estas eĉ nun ŝatataj kaj citataj, ankaŭ kantataj; kaj en ilia ombro restas lia liriko (ekzemple, la ciklo dediĉita al Avdotja Panajeva), elegioj, satiroj, publicista verkaro, kaj lia redaktado de la revuoj *Samtempulo* kaj *La Patrolandaj Kronikoj*. **AIKO**



## VANJKA\*

*Ridinda sceno! Stulta fiakrist',  
por plaĉi al la pasaĝer' bonstata,  
purigas jungo-ŝildojn kun persist'  
sur ĉevalaĉo magra, turmentata.  
Ĉu same vi, ho aĉetebla bel',  
al falsa bril' strebante, inter haroj  
kirlumas diligente, laŭ model',  
sur kapo, duonkalva jam de jaroj?  
sed ambaŭ vi – stultulo la koĉer',  
kaj vi, kombita plej ridinde damo, –  
ne ridon vekas enanime – sed, en ver',  
por mi videblas ĉie dramo.*

<1850>

\* \* \*

*Ne scias mi eston de homoj ceteraj, –  
por mi pleje karas la bonoj surteraj.  
Mi amas la teron, la sunon laŭ vol',  
deziras, esperas, pasias ĝis bol'.  
Avidas l' orel', scivolemas okulo,  
kaj mi en deziroj malsatas, ardulo.  
Do kial mi ĉiam sopiras en ploro,  
por vana malĝoj' disipiĝas la koro?  
Mi kial ne iras laŭ larĝa vojeg'  
por bonoj de l' vivo, en bunta homgreg'?*

<1855 aŭ 1856>

## ELEGIO

*Kaprica modo al ni diras kun leĝero,  
Ke tro malnovas temo – “de popol' sufero”,  
Kaj ke forgesi tion devas poezi'.  
Ne kreu, junaj! Ja ne malnoviĝas ĝi.  
Se jaroj povus ĝin oldigi laŭ bonvolo!  
Prosperus dia mond'!.. Sed ve, dum la popolo  
Treniĝas en mizer', al vip' obee nur,  
Samkiel magraj brutoj sur falĉita rur',  
Priploros Muzo l' sorton, servos al libero,  
Ne eblas unuiĝ' pli firma sur la tero!..  
Dum festas hom-amaso kun jubil' kaj kant',  
Rememorigo pri popolo-suferant',  
De l' potenculoj al popol' atent-altiro –  
Ĉu eblas ja destin' pli inda por la liro?..*

*Dediĉis liron mi al la popola bon'.  
Kaj eĉ se mortos mi lasita, sen rekon',  
Mi servis ĝin – do sentas kor' trankvil-efikon...  
Ne ĉiu militant' damaĝas malamikon,  
Sed – iru al batal'! Kaj sort' decidis tuj...  
Mi vidis tagon: ne plu sklavoj en Rusuj'!  
Mi verŝis dolĉajn larmojn en raviĝo kora...  
“Sufiĉas jubiladi en naiv' adora, –  
Alflustris Muzo min. – Pluiru, jen kondiĉ':  
Liberas la popol', sed kio pri feliĉ'?”..*

*Ĉu aŭdas kantojn mi dum rikoltado grena,  
Aŭ vidas maljunulon en plugado pena,  
Ĉu gaja knabo kun ludemo kaj fajfad'  
Al patro portas manĝon laŭ herbeja pad',  
Ĉu brilas kaj sonoras falĉilar' rapida –  
Mi serĉas la respondon al demand' insida,  
Bolanta en la mens': “Ĉu dum pasinta jar'  
Pli tolereblas jam laboro sur kampar'?”  
Kaj pro libero nuna, post sklavec' jarcenta,  
Ĉu fine venis ŝanĝo klara, evidenta  
Al sorto de popol'? Al kantoj en vilaĝ'?  
Aŭ sonas tie plu malĝojo kaj domaĝ'?”..*

*Vespere venas jam. De l' revoj obsedite,  
Tra kampoj kaj herbejoj vagas mi medite,  
Preteras fojnostakojn en krepuska dens',  
Kaj kanto per si mem formiĝas en la mens',  
Esprim' de meditado ĵusa en sekreto:  
Por kamp-labor' mi vokas benon en kvieto,  
Por malamik' – insulton sendas en kruel',  
Kaj por amik' – plenpovon petas de l' ĉiel',  
Kaj laŭtas mia kant'!.. Tra kampoj ĝi resonas,  
Kaj eĥo de montaro la ripetojn donas,  
Replikis la arbar'... Naturo – en atent',  
Sed mia prikantato en vesper-silent',  
Al kiu la poetaj revoj apartenas,  
Ne aŭdas min, ho ve! – kaj la respond' ne venas...*

<1874>

\* Vanjka (Ivaĉjo). Kutima voknomo por fiakristoj de plej malalta klaso.

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

## Zamenhof: Biografia skizo

**Korĵenkov, Aleksander. Zamenhof: Biografia skizo / Antaŭparolo de Halina Gorecka. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2010. — 64 p., 600 ekz. — (Serio Scio; №9).**

Jen la 9a titolo en la serio *Scio*, aldoniĝanta al aliaj du famaj prizamenhofaj verkoj: la antologio *Mi estas homo* kaj la studo *Homarano*, ambaŭ redaktitaj de la nuntempa ĉefkompetentulo pri la temo, Aleksander Korĵenkov.

La publiko miros, ke aperas en Esperanto verko pli malgranda ol la supre menciita *Homarano*, kiu ŝajnas prezentiĝi kiel ĝia resumo.


Tamen la naskiĝo estis alicela. Esperantic Studies Foundation decidis aperigi en la angla lingvo skizan biografion de Zamenhof, konsiderante, ke kutime la nemultaj linioj, kiuj aperas pri li en la ordinara enciklopedioj, malprecizas kaj malkompletas pri nomo, nacieco, politika agado, filozofia pensado, evoluo de liaj ĉefaj ideoj: preskaŭ nur la lingvo de li iniciatita estas menciata, pri la cetero, apenaŭ kelke da vortoj, se entute.

Tia biografio estis komisiita al Korĵenkov en Esperanto kaj aperis, tradukite kaj adaptite de Ian Richmond, en majo 2010 sub la titolo *Zamenhof: The Life, Works, and Ideas of the Author of Esperanto* (eld. Mondial, Nov-Jorko). Ĝi estas modelo por versioj en aliaj etnaj lingvoj, kaj, celante neesperantistan publikon, ĝi ankaŭ enhavas informojn pri la lingvo mem.

La originala esperantlingva skizo ne aperis prese tiam, ĉar la esperantistoj ja havis je dispono la multe pli ampleksan verkon *Homarano*, sed ĝia (tro) rapida elĉerpiĝo (dua eldono estas planata por la venonta somero) igis oportuna la aperigon de la originala skizo, sen tamen iuj elementoj certe konataj al esperantisto. Sed intertempe venis novaj malkovroj, kaj do la ĵus aperinta *Zamenhof* ne koincidas kun la pasintjara originalo kaj havas novaĵojn eĉ kompare kun la antaŭa volumo (ekzemple pri la patro, Marko Fabianoviĉ Zamenhof). Tial la verko altprocente prezentas temojn kaj datumojn kiujn ne nur la ordinara, sed eĉ la tre sperta esperantisto, tute ne konas.

La tralego de la idealoj de Zamenhof, de lia vivo, de la malfacilaĵoj kiujn li trafis por disvastigi siajn ideojn, ne

lasas la leganton, eĉ spertan esperantiston, sen kortuŝo. Lia migrado de unu loko al alia por serĉi establiĝon kiu donu sufiĉajn monrimedojn por li kaj por lia abunde kreskanta familio; liaj seniluziigoj pri malakcepto de liaj etikaj ideoj eĉ inter la amikoj kiuj akceptis la lingvon; la daŭra timo, ke lia judeco povas ĝeni, do oni ne tro disproklamu ĝin; la sento de mallibereco, preskaŭ sklaveco, kiun donis al li la rolo de Majstro, de kiu li volis kiel eble plej frue liberiĝi: ĉio ĉi skulptas figuron negajan, suferan, malfirman.



La diversaj versioj de lia etika doktrino, unue proponita al limigita rondo kun nomo *hilelismo*, poste tra daŭre evoluantaj broŝuretoj proponata al la tutmondo kiel *homaranismo*, la plumnomoj per kiuj li sin kaŝis, la deziro kunigi la homaron distingante la esencon de la aspiro al paca intergenta vivo disde la akcesoraj formoj religiaj kaj moraj: denove ĉio ĉi montras la timon esti miskomprenata, kontraŭata. Zamenhof devis moviĝi ekvilibre en medioj malsamaj: rigora judismo de la unuaj adeptoj, rigida katolikismo de Beaufront kaj Dombrowski, fakta ateismo de la ĉefaj francaj intelektuloj: la *Preĝo sub la verda standardo* ne plaĉis al iuj, la klara prezento de la interna ideo riskis ofendi aliajn, la patoso de liaj paroladoj estis cenzurita, vortoj kiel “gento”, “nacio”, “popolo” devis esti uzataj tre singarde, laŭ la ĉirkaŭa medio, por ne agaci ies orelojn: Zamenhof moviĝis preskaŭ en minita kampo, strebante ne malplaĉi al amikoj, ateistoj, katolikoj, reformemuloj,

konservativuloj, intelektuloj kiuj ĉiuj klopodis lin direkti, lin konsili, lin (jes ja, ni diru tion klare) malhelpi en lia aspiro al libereco. Esperanto estis jam propraĵo de la diversaj movadgvidantoj, Zamenhof komencis esti pli embaraso ol avantaĝo.

Ŝajnus absurdaĵo aserti, ke Zamenhof kabeis; kaj tamen certe lia ĉefa intereso fariĝis ne plu la lingvo, kiun li tamen daŭre flegis per tradukoj, sed la klopodo krei homaranisman organizon, kun centra templo en neŭtrala lando, kie okazu kunvenoj, kaj kie la familioj lernu konduiti homarane agnoskante la akcesorecon de la diversreligiaj moroj. Por tiu celo li klopodis mobilizi la esperantistojn, kiuj ŝajnis al li la plej fekunda tereno por tiu agado, sed li ricevis akcepton tre malvarman; jam la Bulonja Deklaracio estis frostiginta ĉiujn etikajn ligojn de la lingvo, kaj la postaj elpaŝoj trafis al opozicioj diversdevenaj, jen el judaj gazetoj, jen el polaj, do ĝuste el la medioj en kiuj li devis vivi. Cetere la nepreco de komuna lingvo kiel centra kuniga elemento por la homaranisma filozofio malaperas; Esperanto vivas kaj sukcesas, kvankam modeste, per si mem, en alia medio.

Ĉion ĉi Korĵenkov prezentas en tre preciza kaj bone dokumentita maniero; sed leganto memoru, ke ne temas pri rakontita historio, sed ja pri biografia skizo; tial ege oftas eldiro de faktoj tra mallongaj frazoj, sen komentario. Malgraŭ tio, la legado estas fascina kaj la sinsekvo de la okazaĵoj kaptas la leganton; la aŭtoro ne elmetas juĝojn, li klopodas diveni kaŭzojn de tiu aŭ alia ago aŭ sinteno de Zamenhof dum lia longa vojo de cionismo ĝis tutmondismo, de la unuaj diskutoj pri ebla komuna tero por hebreaĵoj ĝis komuna centra loko por kunveno de homaranoj, de la junaĝa judmora praktikado ĝis preskaŭa indifereco por la religioj kaj fine ĝis ebla realproksimiĝo al la ideo de postmorta vivopluo. Lia baraktado inter la lingvaj reformproponoj ĝis la konsciigo pri esperantista popolo kiu sian lingvon jam havas, kaj do akordiĝon kun la Delegitaro oni povas simple neglekti; tion Korĵenkov interpretas sagace, surbaze de plena kompreno pri la homo, tamen sen esperantismaj misvidoj. Li amas sian protagoniston, sed elmetas lin aperte al la juĝo de la historio.

Ampleksa bibliografio kontribuas al la scienceco de la verko.

**Carlo Minnaja**

## Sed nur fragmento


Malgraŭ jama konateco kiel recenzanto kaj kultura aganto, la aŭstraliano Trevor Steele (1940–) alvenis kun kometa subiteco en nian beletron. Tamen la kometo restis longe nerimarkata, ĉar lia granda (448 paĝoj) kaj grandioza romano *Sed nur fragmento*, eldonita de *Fonto* (Brazilo) en la jubilea jaro 1987a, atingis la (precipe alikontinentan) publikon kun plurjara malfruo. Nu, en nia kutime testud-mova beletra mondo tio ne multe gravas...

Jen resumeto, necese malkompleta, de la intrigo:

En la dua duono de la 19a jarcento la rusa sciencisto Maklin alvenas Nov-Gvineon por antropologiaj esploroj. Konatiĝo kun la indiĝenoj kaj kun ties vivo ekŝancelas kelkajn liajn certojn pri la supereco de la blankula civilizo. Post forveturo pro malaro, Maklin agas en universitato aŭstralia, respektate pro la famo de siaj esploroj. Li enamiĝas al la filino — bela, inteligenta kaj eĉ telepati-kapabla — de la estonta ĉefministro de Kvinslando. Ŝia akcidenta morto komprenigas al Maklin la ekziston de metempsikozo, transmorta migrado de animoj. Maklin kontraŭvole implikiĝas en politikon, kaj — celante protekti siajn nov-gvineajn amikojn kontraŭ eŭropa koloniado — konfrontiĝas kun sia preskaŭ-bopatro. Reveninte al Nov-Gvineo, li trovas ke la germana ekspansio ĝin mis-ŝanĝis. Li baldaŭ mortas, murdita de indiĝeno.

Jen temo de antaŭ du jarcentoj, kiu sin apogas sur historiaj faktoj. Efektive vivis la rusa etnologo Nikolaj Nikolajevič Mikluĥo-Maklaj (1846–1888), kaj pluraj romaneroj estas ĉerpitaj rekte el lia vivo, ekzemple (laŭ Sten Johansson): “la bruligado de alkoholo por impresi novgvineanojn, la enamiĝo al filino de ĉefministro kaj la rolo de lia germana scienca kolego (romane Schniff, reale Finsch) je la germana anekso de nordorienta Novgvineo en 1884”.

Tamen, ĉio estas vidata per moderna rigardo, kiu kontemplas senantaŭjuĝe la diversecon de kulturoj. *Sed nur fragmento* meritis aperi en kiu ajn lingvo — kaj tio ne estas malgranda laŭdo en nia literaturo finfine modest-dimensia. Malgraŭ sia nenioma rilato al Esperanto, la libro portas mesaĝon esperantisman: necesas kompreni kaj konservi ĉiujn kulturojn de nia planedo.



Laŭ pli eksplicita klarigo de Gerrit Berveling: esperantismo «ne estas nura okupiĝo, pri planlingvo nomata Esperanto; ĝi entenas multe pli: i.a. gravegas certa respekto antaŭ alies kulturoj, respekto antaŭ homoj de aliaj rasoj. Maklin estis ruso el la carisma periodo. Li estis edukita kun idealoj kiel “nia Eklezio” (= la rusa ortodoksa), “nia Patrio” (= Ruslando) super ĉio en la mondo, “nia Scienco” (= tiama pozitivismo) super ĉiuj veroserĉadoj de la universo. Kaj la verko konvinke lin portretas tia homo, serioza, sindediĉa, vivanta. Sed — kaj jen ekas la esperantisma temaro: li ekdubas, troviĝante inter la “sovaĝuloj”, ĉu vere tiuj estas malpli kulturitaj ol eŭropkulturaj homoj (ekz liaj ambaŭ servistoj, el kiuj unu miksrasa), li pli poste serioze ekdubas pri sia heredita valorsistemo scienca — ĉu ne Shakespeare mem siatempe jam asertis ke “estas pli sub la ĉielo, Horacio, ol ni povas klarigi”? Pozitivismo montriĝas ne sufiĉa por klarigi la totalon de l’ realaĵoj okazantaj. Tio lin ege skuas».

Ni daŭrigu la idean analizon kun Johansson: “Iom post iom dum la legado de *Sed nur fragmento* oni malkovras, ke ĝia ĉeftemo tamen estas nek scienco nek politiko, sed religio. Pli precize temas pri la serĉado de religio nova aŭ novepoka”, “iom da ŝamanismo, grajno da ekzorcado, kulero da spiritismo, pinĉpreno da palpo-kuracado, taso da renaskiĝado, manpleno da telepatio kaj klarvidado, kaj fine la panteisma sento ke ĉio devas esti ero de unu granda plano”. Same kiel Johansson, mi trovas malpli konvinka tiun faceton de la romano ol la kreadon de turnoriĉa intrigo kaj plurdimensiaj rolantoj. (Cetere,

la temo de renaskiĝo kaj ripetaj vivoj hante revenadas en la verkaro de Steele. En la antaŭlasta *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*, la aŭtoro insistis pri la realeco de ia postmorta vivo malhavas artisman pravigitecon, aperante tute lastminute, kvazaŭ ŝtupareja postpenso; en la lasta, *Flugi kun kakatuoj*, ĝi pli bone enkadriĝas en la mondon de aborigena kredaro.)

Laŭ, Poul Thorsen, la “berserka furiozo kaj la aliaj magiaĵoj de l’ indiĝena ĉefo Kodi, simisimila, kredoble allogos precipe brazilanojn, kiuj laŭdire (kaj eĉ laŭkonfirme) ofte travivas same frapajn okultajn misterojn”. Fakte, la aŭtoro persone konfirmis al mi, ke li mem atestis en Brazilo scenon kie homo (cetere, esperantisto) subite elmontris supernaturan forton, kvazaŭ posedate de demono.

Inter pluaj virtoj de la romano, substrekindas ĝia sukcesa strukturo (Johansson: “Tro da Esperantaj romanoj jam fiaskis pro netaŭga konstruo aŭ komenciĝis bone sed perdiĝis survoje al misa fino”) kaj ĝiaj stila riĉo kaj humuro. Poul Thorsen: “Svarmas trafaj provoj pri piĝinigo de nia lingvo, kaj spicas la stilon ridige belaĉa slango. Tiu humura subfluo efike kontrastas kun la serioza dokumentado. Elstaras la figuro kaj ĵargono de Santamaria, servisto cinika, viktimo de kurioza filozofiado poltrona, pigre surpuga. Ĉu la tertremo lin masturbigas, aŭ ĉu pro lia masturbo okazas tertremo?”

Oni povas “iomete bedaŭri”, denove kun Johansson, “ke la virinaj portretoj emas esti pli unudimensiaj — ĉu sanktulino, ĉu anserino, ĉu seksa logilo”.

Anekdot: tial ke temas pri unu el niaj dek plej bonaj romanoj, en 1990 mi entreprenis traduki ĝin al la franca, kaj la sama eldonisto (Jean-Pierre Sicre) kiu en la sepdekaj jaroj malakceptis aliulan proponon pri *Kazohinio*, respondis ke la prov-ĉapitroj impresas lin favore. Tempo mankis por provi kiel impresus la tuto.

En la plej freŝa numero de *Esperanto sub la Suda Kruco*, la aŭtoro diras pri *Sed nur fragmento*: “Ĝi estis kvazaŭ resumeto de mia vivo ĝis tiu tempo. Kvankam temas pri aventurromano, mi metis en ĝin tre multajn proprajn spertojn kaj pensojn”, eble pli multajn, ol en la aliajn, ĉar tiam li “estis 40-jara kaj do <...> utiligis la travivaĵojn de kvar dekoj de jaroj.” Tiu “utiligo” portis al ni ĉiuj enorman literaturan profiton.

István Ertl

# Mi neniam kontentas

## Novjorka intervjuo

Ulrich Becker (1952) estas Germano, al multaj konata kiel verkisto (*La aĵoj kaj la sezonoj, Ĉiuj dioj estas for, Novjorkaj poemoj*). Mi renkontis lin ĉi-septembre en Novjorko kiam li en rolo de eldonisto lanĉis la anglalingvan romanon *Reluctant Messiah* de Trevor Steele.

**Certe multaj konas vin ankaŭ pere de via longjara Germania esperantumado (redaktado, kunorganizado de la berlina UK...), sed de 1999 vi vivas kaj laboras en Usono.**

Mia vera okupiĝo estas nun projekt-managĝero dungita de malgranda firmao. Mi manaĝeras tradukadon el kaj en ĉiujn lingvojn, organizas fremdlingvan sonregistradon, dubladon, kreas subtito-lojn, ĉion, kio rilatas al son-, vid- kaj aŭdmaterialoj.

**Ĉu vi mem tradukas?**

Nur en la germanan kaj ne jurajn, medicinajn, tro teknikajn materialojn. Plej volonte mi tradukas art- kaj literatur-rilatajn tekstojn, ekz. por fotistoj, modaj katalogoj.

**Via dua laboro estas eldonisto de la eldonejo Mondial, kiun la esperantistaro renkontadas pere de, ekzemple, Beletra Almanako. Kiom da libroj vi jam publikigis?**

De 2004 proksimume 150, se mi enkalkulas ambaŭ uzatajn lingvojn: la anglan kaj Esperanton.

**Ĉu Mondial ekzistas de 2004?**

De 1996. Ĝi estis fondita en Berlino.

**Do, ni reiru al Germanio. Vi studis la francan kaj la rusan en Humboldt-Universitato en Berlino kaj laboris kvin jarojn kiel lingvoinstruisto en gimnazio ĝis venis voko de Detlev Blanke, la gvidanto de la Esperanto-Asocio de Germana Demokratia Respubliko (GDREA) en Kulturligo de GDR. Kial li elektis ĝuste vin? Kaj kia estis via ĝistiam rilato al Esperanto?**

Pri Esperanto mi legis la unuan fojon en iu taggazeto kiel infano. Mi estis 17-jara kiam mi vidis E-lernolibron en vendejo, aĉetis ĝin kaj ene de duonjaro mi parolis la lingvon. Mia unua vizito al Esperanto-kunveno tre negative impresis min, tial mi nur abonis gazetojn, hejme legis ilin, sed dum longa tempo ne iris inter la samideanojn. Nur sep jarojn poste mi reprovigis kaj renkontis interesajn homojn en Berlino, decidis partopreni traduk-konkurson organizitan de



la organo de GDREA, *der esperantist*, kaj gajnis ĝin. Pro tio, kiam en 1988 Detlev bezonis novan dungiton por sia oficejo, li alvokis min.

**Kiajn taskojn vi ricevis?**

Mi okupiĝis pri instruaj kaj organizaj aferoj: verkis kaj gvidis korespondan kurson, skribis artikolojn kaj recenzojn kaj helpis organizi aranĝojn.

**Kaj kion pri eldonado?**

En Berlino ni eldonis dum kvar jaroj malpli ol dek librojn. Mi laboris en Kulturligo ankaŭ post la grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, kaj kiam tiu ĉi organizo akumulis multe da interesa materialo ekz. historiajn esplor-tekstojn, por povi eldoni ilin, kolego en Kulturligo kaj mi registrigis en 1996 en Germanio novan entreprenon: *Mondial*.

**Nun ĝi estas Usona entreprenon. Ĉu vi estas la posedanto?**

Ne. Dum longa tempo mi ne havis la vizon bezonatan por posedi ĉi tie firmaon.

**La retpaĝaro de Mondial listas ne nur beletraĵojn, sed ankaŭ verkojn pri lingvistiko, politiko, psiĥologio, geja literaturo... Kio estas la plej sukcesa?**

Tio daŭre ŝanĝiĝas. Se iu temo aŭ iu homo estas en la novaĵoj, la pria literaturo vendiĝas pli bone.

**Granda parto de viaj publikaĵoj estas reeldonoj.**

Laŭ la usona leĝo ĉiu libro de antaŭ 1923 estas senkopirajta. Tio, kompreneble, helpas.

**En Esperanto vi aperigis, ekzemple, la vortaron de John Wells, verkon de Wera Blanke, de Aleksander Korĵenkov kaj vian propran Esperanto in The New York Times (1887-1922).**

Vidu, ankaŭ tie mi ĉesis ĉe la jaro 1922, ĉar la kopirajto por la *Times*-artikoloj el la postaj jaroj kostus ege multe.

**Mi miris, ke vi kuraĝis eldoni la multekostan Esperanto Literature de Sutton kaj des pli mi miris kiam mi eksciis, ke jam preskaŭ 400 ekzempleroj estis venditaj de ĝi.**

Tiu sukceso ŝuldiĝas al la escepte kvalita laboro de Sutton kaj al la granda entuziasmo de esperantistoj. Ili kredas, ke la libro estas grava, ke ĝi devas esti disvastigata, kaj do atentigis pri ĝi siajn bibliotekojn, universitatojn... Mi aldonu, ke eldoni vortarojn kaj lernolibrojn ne estas risko, ili ĉiam bone vendiĝas.

**Ĉe tia kvanto de eldonaĵoj certe necesas helpantoj.**

Jes, mi havas regulajn provlegantojn, iun kiu faras gazetarajn komunikojn, dezajniston de kovriloj...

**De kie vi havas la konojn pri tiu kompleksa laboro?**

Mi studis libroeldonadon en Pace-Universitato. Nun mi fieras ke *Mondial* estas ĝis nun ŝajne la sola Esperanto-eldonejo, kiu estas komplete en la internacia librovenda retejo.

**Kie vi presigas viajn publikaĵojn?**

Mi uzas du presejojn de la sama firmao, unu estas en Usono, unu en Britio, kaj baldaŭ plian en Aŭstralio.

**Ĉu vi ŝatus fari la eldonistan laboron plentempe?**

O, jes!

**Ĉu do Ulrich la eldonisto kontentas?**

Mi neniam kontentas. Ĉion eblas fari pli perfekte, pli efike. Relative mi tamen ne malkontentas, sed se mi havus pli da tempo, pli da financa potenco...

**Kion vi planas por la venonta jaro?**

Mi scias, ke parton de miaj eldonotaĵoj mi trovos "survoje", sed mi havas ankaŭ liston de titoloj publikigotaj ĝis la malfrua printempo de 2011 (vidu [www.librejo.com](http://www.librejo.com)). Unu el ili estas la anglalingva traduko de *Modernaj Robinzonoj* de Tivadar Soros (Teodoro Ŝvare): *Crusoes in Siberia*, tradukita kaj redaktita de Tonkin, kun antaŭvortoj de liaj du famaj filoj: Paul kaj George Soros.

**Nenia ripozado?**

Novjorko faras la homojn entreprenemaj kaj kreemaj. Ĉi tie oni laboras. Eble tre maljuna mi volos pacon, sed ne nun.

Intervjuis Katja Steele  
(Foto de Detlev Blanke)

## Belartaj konkursoj de UEA en 2011

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 62a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 96a Universala Kongreso en Kopenhago. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉoj Infanlibro, Filmo kaj Kanto. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200×65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Dialogo kaj interkompreno", proksimuma longo 400×65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja".

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2010. Unu premio.

Filmo kaj Kanto: La juĝantoj priatentos la produktojn aperantajn sur la Esperanto-scenejo en tiuj du branĉoj kaj, se ili opinias iun verkon valora, ili atribuos la koncernajn premiojn. Aŭtoroj povas ankaŭ mem proponi siajn verkojn (vd. la regularon). Se temas pri jam publikigitaj verkoj, la publikigo devis okazi en 2010.

Ĉiujn konkursaĵojn – en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo Infanlibro, kiujn oni devas havigi en kvar ekzempleroj – oni sendu al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari (viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio) aŭ prefere rete al [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it), indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de marto 2011.

Premioj: unua premio 240 eŭroj, dua premio 168 eŭroj, tria premio 96 eŭroj; Nova Talento 168 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 504 eŭroj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ ĉe [uea.org/dokumentoj/belartaj\\_konkursoj\\_regulato.html](http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regulato.html).

## Ricevitaj libroj

*Jarlibro de Rusia Esperantista Unio. 2004* / Kompilis Nikolaj Gudskov, Georgij Kokolija, Miĥail Ĉertilov, Viktor Aroloviĉ. — M.: REU; Impeto, 2004. — 20 p. — [Donaco de Grigorij Arosev].

*Jarlibro de REU. 2006.* — Ŝumerlja; M.: REU, 2006. — 23 p. — [Donaco de Grigorij Arosev].

Korjenkov, Aleksander. *Zamenhof: Biografia skizo / Antaŭparolo de Halina Gorecka.* — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2010. — 64 p.; 600 ekz. — (Serio Scio; №9). — [Donaco de Sezonoj].

Maĝarova, Ivaniĉka. *Kardo sur kasko = Бодил на шлема: Hajkoj = хайку / Antaŭparolo de Olja Nedkova.* — Sofia: Amadeus, 2010. — 64 p., il. — [Donaco de Ivaniĉka Maĝarova].

Parès, Yvette. *La afrika medicino, mirige efika / Tradukis el la franca Jacques Roux; Prefaco de Jean-Pierre Willem.* — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2006. — 200 p. — [Donaco de KAVA-PECH].

Stampa, Siegfried. *Jim' la migrulo: Aventuroj de juna leopardo / Tradukis el la germana Rüdiger Sachs.* — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2007. — 176 p., il. — [Donaco de KAVA-PECH].

Ulrich, Hans. *Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi / Tradukis el la nederlanda Benata Hengstmengel-Koopmans.* Dobřichovice: KAVA-PECH, 2008. — 112 p., il. — [Donaco de KAVA-PECH].

## Ricevitaj gazetoj

Dia Regno, 2010/4; EAB Update, 2010/51; Esperanta Finnlando, 2010/4-5; Esperanto aktuell, 2010/5; Esperanto en Azio, 2010/69; Esperanto en Danio, 2010/5; Esperanto, 2010/11; Ĝenerala Informilo, 2010/163; Internaciisto, 2010/4; Juna Amiko, 2010/2; La Arĝenta Gruo, 2010/5,6,7; La Lanterno Azia, 2010/10; La Movado, 2010/715,716; La Ondo de Esperanto, 2010/11; Litova Stelo, 2010/3; Monato, 2010/11; Scienco kaj Kulturo, 2010/5; Spiritisma Esperanto-Informilo, 2010/141; Tempo, 2010/2.

## Omaĝe al Clarence Bicknell

Okaze de la 100-jara ekzisto de Federacio Esperantista Itala (FEI), ĝi kunlabore kun la Internacia Instituto de Liguraj Studoj kaj la Kultura Sekcio de la Urbo de Bordighera en la tiea Bicknell-Muzeo aranĝis du-tagan seminarion (23–24 okt 2010) pri Clarence Bicknell (1842–1918), pioniro de Esperanto en Italujo kaj natur-sciencisto.



Prof. Fabrizio Pennachietti (Universitato de Torino) prelegis pri la origino de Esperanto kaj ties disvastiĝo en nordokcidenta Italujo kun aparta konsidero de Ligurio. D-rino Daniela Gandolfi, la direktorino de la Instituto, resumis la esperantistan agadon de Bicknell, pri kiu atestas multaj dokumentoj kaj objektoj en la Muzeo mem, kiun Bicknell konstruigis kiel kulturen centron kaj kunven-ejon de la esperantista grupo *Antaŭen* de li fondita. Elisabetta Vilisics donis superrigardon pri la strukturo de Esperanto por la ĉeestantaj neesperantistoj (la plimulto el proksimume kvindeko da personoj). Pri la celo de la Esperantomovado parolis d-ro Renato Corsetti en sia rolo de prezidanto de FEI.

La dimanĉo estis rezervita por ekskurso al Casterino (en la Roya-valo), kie en 1905 Bicknell konstruigis ĉaledon, de kie li entreprenis siajn esplorojn de prahistoriaj rok-gravuraĵoj en la ĉirkaŭa alt-montaro. La ŝturojn kaj la internajn murojn de ĉi domo Bicknell provizis per ornamoj kaj sentencoj en Esperanto kaj la angla. Vizito de la Prahistoria Muzeo de Tende fermis la du-tagan programon.

Reinhard Haupenthal

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)


Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

Por la oktobra tasko venis 12 respondoj, inter kiuj 9 estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Edeltraut Henning (Germanio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Dorota Burchardt, Zbigniew Tylkowski, Russ Williams (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Vladimir Romanov (Ruslando).

La ĝusta solvo: 1. aksiomo; 2. ikono; 3. tektoniko; 4. kelidonio; 5. ankro; 6. anatemo; 7. Andoj; 8. Irano; 9. Hipokrato; 10. akcidento; 11. torfo; 12. alkemio; 13. Florido; 14. Ĉinio 15. aŭdo; 16. tilio.

La loto donis libropremion al **Dorota Burchardt**. Ni gratulas ŝin!

## Krucvortenigmo



**Horizontale.** 1. Krucŝtono el antikva Grekio; 4. Ĝirafino en ĝangalo; 10. Ĝin spektas turistoj ĉe Niagaro; 11. Mara fiŝo de familio klupeedoj; 13. Pumpilo de emocioj; homa motoro; 14. Organika kombinaĵo, kiun oni uzas en produktado de farboj, en farmacio kaj eksplodaĵoj; 15. Arbo, kies ŝelo estas uzata por tanado, la ligno por tornaĵoj; 18. Fabela insulo en Atlantiko, malaperinta en la pratempo; 19. Grandega urbo de la Korea respubliko; 21. Solena kanto kiel ŝtatsimbolo; 22. Aŭstralia papago; 26. Malinde pretendi pri iuj privilegioj; malŝate kondukti kontraŭ aliaj; 27. "Magneto" por sukceso; 31. Fluaĵo por skribi; 32. Vorto de scienca senco; 33. Hidroteknika konstruaĵo; 36. Tiu ĉi altvalora mineralo estis talismano de Julio Cezaro; 37. Legomo precipe utila por diabetuloj; 38. Vidpunkto; 39. Rotacianta parto de dinamomaŝino.

**Vertikale.** 1. Tero de la noktomeza Suno en Usono; 2. Ĉefa pretendanto por la ora medalo en sporto; 3. Korala konstruaĵo; 5. Manĝaĵo havanta aspekton de mola pasto, precipe farita el faruno kun lakto, aŭ el legomoj longe kuiritaj; 6. Tia, ke la linioj estas egaldistancaj unu de la alia; 7. Sesono de drakmo (plurale); 8. Tuto de la pelagaj vivuloj, movataj de la akvofluoj; 9. Eŭropa ĉefurbo kun la sidejo de la Organizaĵo de Petroleksporthaj ŝtatoj; 12. Glitveturilo; 16. Supra parto de gorĝo; 17. Gaso, unue malkovrita sur la Suno, kaj poste ankaŭ sur la Tero; 20. Tiu ĉi spica planto menciigita en la Malnova Testamento kaj en antikvaj orientaj libroj; 23. Solene sciigi; 24. Delikate plaĉa kaj alloga pro sia agrableco; 25. Kemia elemento Sb; 28. Lando, kie ĉiuj virinoj, krom vidvinoj, devige portas ornamaĵojn; 29. Profito de investita kapitalo; 30. Ŝelo por ŝirmi en ĝi pupojn dum la metamorfozo; 34. Kapti ies spiriton; 35. Subtera loko, el kiu oni elfosas mineralojn.

La solvoj atingu la redakcion poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de januaro 2011.

Kompilis Viktor Alikin

## Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

### Ne nur dura trafikado

... la molaj trafikantoj ne estas forgesitaj ... (Ileana Schröder. *Danio, la venontjara kongreslando* // *Esperanto*, 2010, №11, p. 221)

### Malfreŝa, sed bongusta

La usonaj esperantistoj elektas la gustan vojon (*Esperanto*, 1957, №1, p. 25; rimarkis Ionel Onet)

### La terura germana lingvo, aŭ: ĉu Museum, muzeum, aŭ muĉŝeum?

Multaj partprenantoj estis ankaŭ en kelkaj aliaj mond-famaĵoj Vienaj muzeoj ... kiel Kunsthistorisches Museum, Naturhistorisches muzeum, Heeresgeschichtliches Muzeum. (Aida Ĉiĝikaitė. *Muzea nokto en Vieno* // *Litova Stelo*, 2006, №6, p. 17; rimarkis Walter Klag)

### La terura germana lingvo 2, aŭ: Standard MachinTraduk

Robert Schuman... estis naskita en 1886... Lia gepatra lingvo estis luksemburgaj sed li estis instruita franca kaj Standard German en la lernejo. (*Biografio de Robert Schuman* // *Eŭropa Bulteno*, okt 2010, p. 13)

### La terura germana sistemo

Lia universitata eduko en leĝo, ekonomiko, politika filozofio, teologio kaj statistika tookloko en la germana eduka sistemo. (samloke)

### Unu granda rondo familia, aŭ: Ni iru la vojon ĉelitan

"Familio Esperanto"... komence de la 2000aj havis ŝelitan adresliron de pli ol 400 personoj. (Amri Wandel, [groups.google.com/group/denask/browse\\_thread/thread/577af5f19745ce0c](https://groups.google.com/group/denask/browse_thread/thread/577af5f19745ce0c), 4 nov 2010)

### Amri foriras kun du

... mi troviĝas en la sama kontinento (paropreninte en la Oomoto festo en Braziljo kaj nun survoje al Bona Espero) (Amri Wandel, [groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15226](https://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15226), 15 okt 2010)

### Kurento ne alterna

... en la estrarelektoj la Komitato devas unuavice voĉdoni por sen-alternativa propono de la Elektra Komisiono (Amri Wandel, [groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5889](https://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5889), 25 aŭg 2019; rimarkis Andy Künzli)

### Elektita tamen, estu pri li amen

Kurioze la grupo konsistas ... el la prezidanto de ILEI kaj la apenaŭ elektita estrarano pri la scienca kaj faka agado. (Barbara Pietrzak, 12 nov 2010, [groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6143](https://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6143))

### Kiom da kapoj, tiom da ranoj

Mikaelo Onfrajo naskiĝis en 1959, en franca kaparana familio. (Michel Onfray. *Traktaĵo pri ateologio*. SAT-EFK, 2010, dorskovrilo; rimarkis Ionel Onet)

Plukis István Ertl

## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

**Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tu, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530




**Indonezio.** Ĉi-aŭtune Heidi Goes (Belgio) prelegis pri Esperanto kaj instruis ĝin en pluraj urboj de Indonezio (vd. p. 11) — en kelkaj el ili poste ekfunkciis Esperanto-klubo kaj rondetoj. Sur la foto estas unu el kvin klasoj de la mezlernejo SMAN 3 en Medan, Sumatro post enkonduka leciono. (Heidi Goes)



**Ĉuvaŝio.** Ĉeboksaro estas ne nur la ĉefurbo de Ĉuvaŝio, sed ankaŭ la ĉefurbo de la lingvofestivala movado. Ĉi-oktobre tie okazis la 15a sinsekva Festivalo kun prezentado de preskaŭ 50 lingvoj (vd. p. 7). Sur la foto: Miĥail Ĥaminskij montras la japanan ideogramon “granda”. (Irina Jakovleva)




**Ruslando.** 31 okt en Moskvo okazis la 5a Lingva Festivalo, en kiu estis prezentitaj pli ol 70 lingvoj; ĉeestis ĉ. 400 personoj. Unuafoje pri la Moskva LF raportis tutlanda televido kaj centra gazeto *Izvestija*. Sur la foto: prezentado de la okcitana lingvo. (Valentin Melnikov / Irina Fedotova)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*  
 Serio *Scio*, Volumo 9  
 64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*  
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6  
 168 paĝoj, 15 eŭroj



*Dek libroj* / Kompilis Aleksander Korĵenkov  
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1  
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj



*Dek gazetoj* / Kompilis Aleksander Korĵenkov  
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2  
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj